

VALO



KONTRAŬFLUE

Broŝurservo de SAT
Esperanto - Laŭtel
FR-47470 Beauville

VALO

KONTRÄŦFLUE

Mi dankas

Kdon E. Borsboom en Utreĥto,
Gekdojn Castelló en Beziro,
kiuj bonvolis kritike tralegi mian manuskripton, kaj kies altvaloraj konsiloj tre efike helpis min.

Noto de SAT-broŝurservo :

La unua eldono de tiu ĉi dua parto de aŭtobiografia verkaro de kamarado kaj amiko Valo (ps. de Rajmundo Laval) aperis en 1980 en la kadro de broŝura serio de "La Juna Penso" (organo de SAT-Junulfako). Konforme al la deziro de Valo estas pluraj korektoj al la teksto de la unua eldono.

La aŭtoro mem preparis la frontpaĝon.



Pro memoro
al

- mia kuzo Fernand C., falinta en Verduno en la aĝo de 28 jaroj
la 22an de septembro 1917 ;
- miaj tri gimnaziaj instruistoj:
S-roj Ch. kaj S., mortigitaj en 1914 ;
S-ro G. L., mortigita en 1918 ;
- mia amiko Maurice D.
mortigita en sia 20-jara aĝo ;
- miaj amikoj Gaston V. kaj Pierre R.,
mortintaj 19-jaraj ;
- mia amiko Ali ben Abdallah
mortinta 17-jara sekve de kuglovundo ;
- Samideano Rouveret, instruisto en Bagard apud Anduzo
membro de la grupo "l'Espero Alesa",
mortigita ;
- mia patro, miaj tri onkloj,
parencoj kaj amikoj,
kiuj suferis en la tranĉeoj ;
- kaj al ĉiuj, francaj, germanaj kaj ĉiulandaj viktimoj
de la Granda Milito
1914 - 1918.

Antaŭparolo

En tirkesto de malnova skribotablo, sub polvotavolo, kuŝis forgesita kajero. Dika kajero el liniita papero. La blankaj paĝoj flavetiĝis ĉe la randoj, la viola inko paliĝis.

Hazarde retrovinte ĝin, mi foliumas. Neta skribo, zorge formita per plumo el ŝtalo. Ĝusta esperanto laŭ imito de Zamenhof kaj de Bofronto, arkaismoj, kunmetaĵoj ĉerpitaj el Grosjean-Maupin. Mallerta stilo, naivaj rakontoj kaj rimarkoj.

La knabo, kiu tagon post tago skribis tiujn notojn, estis 14-jara en 1914. Dum la kvar jaroj, kiuj restas en la homara memoro tiuj de la Granda Milito, li vivis en trankvila regiono, sepcent kilometrojn for de la plej proksima batalfronto. Neniam li aŭdis kanonon aŭ bombojn, neniam vidis en la ĉielo la minacon de malamikaj flugmaŝinoj. De la giganta tragedio li ricevis nur obtuzajn eĥojn. Ili estis kvazaŭ varpo, tra kiu li teksis kiel vefton siajn personajn travivaĵojn kaj sentojn.

Mi tralegis la tuton, kaj elektis kelkajn paĝojn. Mi flankelasis multajn, en kiuj temis pri la detruo de la biblioteko en Louvain, la bombardado al la Remsa katedralo, la pereco per torpedo de la angla ŝipego Lusitania, la kanonego "dika Berta", kiu de pli ol cent kilometroj pafis obusojn al Parizo; pri grandaj bataloj, Tannenberg, Gorizia, pri venengasoj, pri batalĉaroj ktp, ktp.

La elektitajn paĝojn mi kopiis preskaŭ sensange: nur kelkaj neologismoj anstataŭ arkaikaj vortoj, kaj plisimpligo de tro komplikaj kunmetaĵoj, de kompleksaj verbotempoj. Apud la kajero troviĝis apartaj folioj, el kiuj pluraj nedatitaj. Mi interŝovis ilin en la tekston, provante remeti ĉiun en ĝian probablan lokon. Por garantii ekzaktan kronologian ordon necesus pedanta serĉado, studado de dokumentoj kaj arkivoj: la afero ne valorus la penon.

Rezultas ia diĝesto, kiun mi arbitre dividis je ĉapitroj. Al la tuto mi surmetis tiun titolon "**Kontraŭflue**", kiu sin trudis al mi pro la oftaj reagoj de tiu adoleskanto kontraŭ la ĝenerala etoso, kiu regadis en tiu milita periodo.

P.S. En tiu teksto nenie troviĝas la pronomo "ci". Ne tial, ke ŝanĝiĝis mia opinio, sed mi tiurilate respektis la originalon: en la koncerna epoko, la knabo ĉiam uzis "vi", eĉ kun sia patro kaj reciproke; ambaŭ interparolis kaj korespondis ĉiam en esperanto, kaj en tiu lingvo ili ne ciumis.

Prologo 1912

Meze de la lernojaro alvenis novulo. Bruneta vizaĝo, nigraj haroj, grizverdaj okuloj. Parolas france flue kaj ĝuste, kun apenaŭ fremda prononco. Li estas turko el Konstantinopolo.

Samaĝa kiel mi. Esplorinte lian kapablecon pri la diversaj instrufakoj, la direktoro trovis lin samnivela kiel mi, kaj decidis akcepti lin en nian klason.

En Balkanoj furiozas milito inter la Otomana imperio kaj ĝiaj kristanaj najbaroj. La francaj gazetoj estas plenaj de abomenaj rakontoj pri turkaj kruelecaĵoj*. Pri tio, en la klaso, ni ne facile kredas: ĉar nia turka kunlernanto, nia nova kamarado, gaja kaj afabla, estas de ĉiuj favore rigardata. Li kaj mi aparte intersimpatias.

Mi demandis, ĉu li scias novaĵojn pri la milito en sia lando. "Ne pli ol raportas la francaj ĵurnaloj. Mia tuta familio formigris, kaj ni havas tie nek parencojn nek korespondantojn. De nun Francio estas nia lando."

Kaj li rakontis: "Kiam estis anoncita la militproklamo, mia pliagxa frato, kiu estis soldato, faris pakajon el siaj militistaj vestoj, kaj ĵetis ĝin en Bosforon; kaj nia patro decidis, ke ni ĉiuj tuj elmigros."

Kiel tiu familio sukcesis forsavi sin el militanta lando, mi ne scias**.

* Unu jaron poste, dum la dua balkana milito inter Bulgario kaj ĝiaj eks-aliancantoj, la kruelecaĵoj fiuloj, laŭ la gazetoj, estis la Bulgaroj.

Du jarojn poste, kion ili rakontis pri la germana barbareco!

Nun ni scias, kion oni povas kredi al popolo per lerte orientita propagando. Ni scias ankaŭ, ho ve!, ke ofte sufiĉas vesti per uniformo civilizitan homon el kiu ajn nacio, kaj meti armlon en liajn manojn, por fari el li sangavidan bruton.

** En tiu tempo, tio estis relative facila. Oni povis vojaĝi sen pasporto tra tuta Eŭropo, sufiĉis aĉeti trajn- aŭ ŝip-bileton.

Ŝajnas, ke tiam la individuoj ĝuis pli grandan liberon ol en tiu ĉi dua duono de la XX-a jarcento.

I. 1914

1. Freŝa kaj ĝoja

5an de aŭgusto 1914.

"La regiment' de Sambro-Mozo..." *

En mia kapo ankoraŭ resonas la heroeca muziko, blovinstrumentoj kaj tamburoj, kun la martelado sur la pavimo de kvincent paroj da ŝuoj en kadenca paŝado. En la bela sunlumo de tiu varmega somertago, bataliono de la 40-a infanteria regimento marŝis sur la stacidom-avenuo, aklamate de granda popolamaso, viroj, virinoj kaj infanoj.

La soldatoj portis sian kvadratan dorsosakon, peze ŝarĝitan, kaj sur la dekstra ŝultro la longan pafilon, en kies tubobuŝon multaj eningigis rozon aŭ dianton. La lipharoj trastreke akcentis la virecan energion de la vizaĝoj. La junuloj tenis alte la kapon, kaj konveksigis la torson. Ili havis fieran aspekton en sia nova bataluniformo, freŝe eltirita el la regimenta magazeno. Nova, sed ne ŝanĝita. En la lastaj jaroj oni provis por tiuj vestoj plurajn neŭtrajn ŝtof kolorojn - sensukcese: la francaj koroj estis ja sentimente tro ligitaj al la tradicio de la ruĝaj panatalonoj. Sur la verdaj herbejoj aŭ la flavaj grenkampoj, tiuj ruĝaj makuloj, okulfrapaj kiel papavetoj, konsistigos tre oportunajn celaĵojn por la malamikaj pafistoj.

Jes, sed kiu pensas nun pri tio?

En perfekta ordo la infanterianoj penetris en la stacion, kaj per sperta manovro viciĝis antaŭ la vagonaro, kiu ilin atendis.

* Sambro-kaj-Mozo: nomo de franca departemento dum la unua respubliko kaj la unua imperio. "La regimento de Sambro-kaj-Mozo" estas la titolo de tre fama milita marŝo.

La muziko ĉesis, la oficiroj ordonis: "Halt' ", kaj poste: "Ripoz' ! ". La vicoj malrigidiĝis, la muskoloj malstreĉiĝis. La junaj viroj ridetis kaj interŝanĝis ĝojajn kriojn kaj ŝercojn kun la gapanta ĉeestantaro.

De kie ili havis tiom da kretopecoj? Ĉiuj vagonoj rapide kovriĝis de surskriboj: "A Berlin!". Supozeble, trans la nordorienta limo, en similaj urbataj stacioj, similaj trajnoj ricevas surskribojn: "Nach Paris!"

Mi aŭdis, ke la germana imperiestro Vilhelmo II-a bombaste parolis pri milito "freŝa kaj ĝoja". De ĉi tie vidata, tiu milito same aspektas.

La soldatoj envagoniĝis.

Kunpremante sin ĉe la malfermitaj fenestroj, ili daŭrigis la bruan konversacion kun la civiluloj starantaj sur la kajo. "Atendu nin post du aŭ tri semajnoj, post la venko!" Neniu dubas.

Fine, dum la peza trajno ekmoviĝis, ambaŭflanke eksonis multopa voko: "Ĝis la revido! Ĝis baldaŭ!"

Kvazaŭ ĉiuj estus revenontaj.

Fakte, kiom el ili revenos?

Kiam?

En kia stato?

2. Misagordoj

10-an de aŭgusto 1914.

"Ili sentis pasi super siaj fieraj kapoj
La blovon antaŭvenan de la revolucioj,
Kaj la registoj, fiksrigarde al la limoj,
Volas ekigi interbaton de la nacioj.

Ili, teruritaj, malsaĝe esperas
Detumi la koleron minacantan ilian potencon;
Ili esperas dronigi en sango-maro
La venĝan malesperon de la proletaro...

Ni, amikoj, ni volas, ke sur la tuta tero
Reĝu, kune kun paco, bonstato kaj libero.
Francoj, aŭstroj, rusoj, germanoj, britoj,
Ĉiuj popoloj estas destinitaj por frateco.

Kiom da krimoj en la nomo de Patrio!
Kiom da larmoj, sango, abomenoj, funebroj!
De kiu iam estos sufiĉe malglorata
Tiu idolo obstine teksadanta mortotukojn?..."

Tiujn versojn de Sébastien Faure mi deklamis antaŭ monato en familiaj kaj amikaj rondoj. Ĉiuj aŭskultis senproteste, neniuj indignis kaj severe admonis: "Silentu, bubo, vi blasfemas!" Sed nun, kiu kuraĝus ilin rediri?

Nun, krom ege malmultaj esceptoj, la tuta franca popolo komuniĝas en fervoro. Fine venis la tempo de la longe atendita Revengŝo, kiu redonos al ni la rabitajn provincojn Alzacon kaj Lorenon. Granda verkisto kaj patrioto, renkontinte kunfraton kaj amikon, diris al li "kun beleta mentonmovo": "Mi volontuliĝas"*

Cetere, ĉiuj estas sincere konvinkitaj, ke tiu milito estas justa (de nia flanko, kompreneble). Niaj heroaj soldatoj batalas por rajto kaj civilizo kontraŭ la germanan barbarecon. Kaj por la paco, jes: por ke tiu ĉi milito estus la lasta el la lastaj, post fina venko super la prusa militarismo.

Trans Rejno, kompreneble, la tiea popolo estas same certa, ke ĝi, sub gvidado de la amata "Kaiser" (ĉi tie tiom malamata!), prave luktas por defendi la "Kultur" 'on.

16an de aŭgusto.

En kelkaj montrofenestroj de butikoj jam aperis ekspozicie trofeaj objektoj kolektitaj sur la unuaj bataalkampoj: pintokasko el nigra ledofrunte ornamita per la blazona aglo de Prusio kun la devizo: "Mit Gott, für König und Vaterland"***: leda zono kun latuna buko reliefe stampita per la vortoj: "Gott mit uns"****

En nia laika respubliko Dio ne estas oficiale alvokata, sed en la preĝejoj sonas ĥorkanto: "Ho Dio venka, savu, savu Francujon, pro Via Sankta Koro!". Ambaŭflanke la kristanaj pastraroj benas la standardojn kaj la armilojn en la nomo de la Patro, de lia Filo Jesuo, nia komuna frato, kaj de la Sankta Spirito, kiu estas amo. Kiel do ili akordigas sian sintenon kun la ordono de la dekalogo: "Ne mortigu"? Kiel ili povas pravigi la ekziston de malamikaj nacioj,

* Fakte li restis trankvile en Parizo.

** Kun Dio, por reĝo kaj patrolando.

*** Dio kun ni.

kaj ilin glori? Eĉ tiu eklezio, kiu sin pretendas katolika, t.e. universala?

Vere estas, ke tiu Dio de amo kaj paco estas ankaŭ la Eternulo, la Dio "forta kaj ĵaluza", kaj vengema, la "Dio de la Armeoj" de la Malnova Testamento. Ja ĉio estas en la Biblio, kaj la malo de ĉio: kion vi ne trovas en la linioj, tion serĉu inter la linioj...

Kaj tiuj, kiuj sin nomas nekredantoj: ĉu ili ne kreis al si novan dion, ne malpli postuleman ol la aliaj? novan dion, kiu volas homajn oferojn; kiu ordonas, ke pro ĝi oni mortu kaj mortigu; kiu tiras la homan familion al glavo sangon soifanta? Ho Zamenhof, eĉ inter viaj disĉiploj, kiom rezistos al la sorĉoj de la idolo Patrio?

Tamen mia patro, en konversacioj, daŭre tenas, trankvile kaj sobre, sian personan komenton pri la kaŭzoj kaj la celoj de tiu ĉi milito: "Tiuj homoj (la germanoj), per sia inteligento, per sia obstina laboro, estis fariĝantaj la mastroj de la tutmonda komerco. Tio ne plaĉis al iliaj konkurantoj, la anglaj kaj francaj kapitalistoj. Tiuj ĉi posedis preskaŭ ĉiujn koloniojn. Ili ne volis, ke la germanoj konkeru eksterajn merkatojn. Tia situacio nepre devis naski konflikton. Sed en tiu afero inter grandaj sinjoroj, la popoloj havas nenion por fari: ili ricevos neniun profiton, kaj rikoltos nur plagojn."

18an de aŭgusto 1914.

Post la morto de Jaurès la socialistoj aliĝis al la "sankta unio". Du el ili akceptis ministrajn postenojn. Gustave Hervé, iama predikinto de la Socia Milito*, prenis al sia buŝo la heroan trumpeton, kaj nun gloras la estontan Venko'n*. Jean Grave kaj Kropotkino aprobas la militon kontraŭ la germanan imperismon, kaj Sébastien Faure singarde silentas. Amiko Klaudius** estas konsternita kaj elrevigita

Hodiaŭ mi renkontis lin en la urbo. Forlasante siajn kutimajn temojn, li koleris kontraŭ la registaron: "Kiaj fuŝuloj! Diru al mi, kial ili ne mobilizas nin, kadukulojn aj kriplulojn, sentaŭgajn rubaĵojn, anstataŭ tiun belan junularon, kiu estas plena je vivo kaj vivdeziro, plej kapabla por laboro kaj amoro, plej efika por ĉia servo? Kial tiuj ogroj bezonas freŝan karnon? Ĉu ni ne estus sufiĉe bonkvalita kanon-viando? Ĉu ni ne prezentus sufiĉe belaspektajn kadavrojn?"

* Titoloj de du gazetoj sinsekve gviditaj kaj redaktitaj de G.H.

** Vd. "...el la kara infaneco", § V.

Tre ekscitite, la foriris en takta lamado, frapante la stratan pavimon per la maldekstra piedo, ĉe la ekstremaĵo de sia rigida kruro. Kaj li grumblegis: "Stultaj krimuloj! Pezaj idiotoj! Sencerbaj klaŭnaĉoj! Sinistraj kretenoj!".

20an de aŭgusto 1914.

Sur placeto klaĉis grupo da virinoj. Unu el ili, kun aparte sonora voĉo, fanfaronis: "Se mi tenus tiun Vilhelmon, mi fortranĉus de li la kojonojn, kaj el ili mi farus du tabakujojn: unu por mia edzo, unu por mia frato!". Ĉiuj laŭte ridegis. Laŭ tiuj simplaj animoj, Kaiser Vilhelmo estas la ĉefa kulpo - kaj kunkulpa lia tuta nacio. Nur ili.

En la popolo ĉirkulas fantaziaj rakontoj pri germanaj kruelegaĵoj. La plej abomena estas tiu pri infanoj, kies manoj estis dehakitaj. Al ĉiu, kiu tion ripetas, mi sisteme demandas: "Ĉu vi mem vidis, per propraj okuloj, tiujn stumpigitajn infanojn? - Mi ne... sed... - Bone, Do permesu, ke mi atendu pli certan ateston."

Videble tiu respondo ne tre plaĉas. Cetere, ĝi konvinkas nenium.

3. Eniro en la realon.

25an de aŭgusto 1914.

Komence de la monato, la raportoj de la ĉefstabo kaj la gazetoj emfazis informojn pri venka antaŭenmarŝo de niaj trupoj en Alzaco. La francaj koroj vibris ĉe la nomoj Thann, Altkirch, Mulhaŭzo. Sed samtempe la germanoj invadis Belgion.

Poste, detalaj novaĵoj fariĝis pli maloftaj. La ĵurnaloj presis dikliterajn titolojn sur la tuta larĝo de la paĝoj: "La fortikaĵoj de Lieĝo plu rezistas" aŭ: "De Belgio al svislanda limo furiozas batalo laŭ 400 kilometrojn longa fronto". Jam du aŭ tri tagojn, preskaŭ nenio.

Hodiaŭ, je sunsubiro, mia patrino kaj mi hazarde pasis ĉe angulo de la urbodomo. Estis ankoraŭ varmege. La pordo de la polica komisarejo estis malfermita, kaj ni aŭdis voĉojn el interne. Tiu de la urba poliestro sonis konsternite: "...sed, se tiel estas... nu, post tri tagoj ili estos en Parizo!..."

Kiun sekretan informon ricevis tiuj ŝtataj funkciuloj?

6an de septembro 1914.

Nun oni scias: grava malvenko en Charleroi, rapidega retiriĝo de la belgaj, anglaj kaj francaj armeoj. La germanoj sturme pelis ilin al sudo, al Parizo. Poste, generalo von Kluck, deviante de la rekta

vojo al la ĉefurbo, turnis sian atakon al sud-oriento, atingis kaj transiris la riveron Marno. Generalisimo Joffre ordonis halton kaj reziston surloke, je kioma ajna prezo.

...(fine de septembro)

Post la Marno-batalo, meze de la monato, la germanoj siavice devis retroiri. Sed baldaŭ ili haltis sur rapide preparitaj tranĉeoj. Fronte al ili, la aliancaj trupoj, tro lacaj por ekspluati sian sukceson, same haste enfosiĝis. La fronto stabiliĝis, krom okcidente: tie, per vastaj paralelaj movoj, ambaŭ armeoj vetkuras por atingi la bordon de Nord Maro.

Dume, en Sudo alvenis mizeraj aroj da forpelitaj civiluloj, belgaj kaj nordfrancaj rifuĝantoj. Ili devis fuĝi, forlasante sian hejmon kaj preskaŭ tutan sian havaĵon. Ili estas bone akceptataj de la ĉi-tiea popolo, kompata al iliaj suferoj.

Aliajn suferojn ni komencas konstati de proksime, nome tiujn de vunditaj soldatoj, evakuitaj for de la batalkampoj kaj flegataj en hospitaloj de la tuta interna lando.

4. Burlesko en tragedio

....

Apud la ĉiutaga tragedio foje sin prezentas burleskaj scenoj.

Hieraŭ vespere estis anoncita la alveno de pluraj belgaj lokomotivistoj kondukantaj siajn maŝinojn. La horo ne estis precize fiksita.

Komence de la milito, la urbestro dekretis, ke ĉiuj kafejoj fermu siajn pordojn ĉiuvespere je la 22a. Por akcepti la belgojn, la ĉefa komandanto de la garnizono decidis, ke la kafejoj fronte al la stacidomo escepte restu nefermitaj, la tutan nokton se necese. Ŝajne li neglektis interkonsenti kun la civila magistrato.

Miaj gepatroj kaj mi troviĝis tie, kiam, dek minutojn post la 22a, venis urba policano: "Fermu tuj!"

Kvin minutojn poste, suboficiro kun taĉmento frapas al la pordoj kaj ordonas malfermon.

Pasis kvaronhoro. Jen alvenis majoro, estro de la urba fajrobrigado kun du el siaj brigadanoj. "Nome de la urbestro, fermu!". Sed subite: "Gardu vin!"; la ordono eksonis kiel pafo. La majoro rigidiĝis en militista pozo, dum eliĝis el ombro la alta silueto de la ĉefkomandanto, envolvita en granda mantelo. La superula voĉo klarionis, kaj, martelante la silabojn: "Mi estas garnizonestro. Ĉiu armilportanto staras sub mia komando. Miaj ordonoj estas nepraj;

ili estos plenumitaj. Iru!". La alia salutis, kaj digne retiriĝis.

Ĉu finite? Ni scivole atendis; kaj baldaŭ ni ekvidis... la urbestron.

La pordoj refermiĝis. La urbestro foriris.

Nun, ĉu kurtenfalo? Ne! Revenas la ĉefkomandanto kun suboficiro kaj taĉmento. Pala pro malvarma kolero, li vokas kafejestron: "Kiu fermigis? - Sinjoro urbestro mem." Al la suboficiro: "Iru kaj arestu sinjoron urbestron." Kaj al la kafejmastro: "Malfermu tuj, kaj sciu, ke en tiu ĉi urbo vi devas obei nur al mi."

Ĝuste en tiu momento alvenis la belgaj maŝinistoj.

Hodiaŭ la afero estas aranĝita. Reglatiĝis la rilatoj inter la militista kaj la civila aŭtoritatoj, sed ni vidis propraokule, kiel en milita tempo la potenco ĉiam restas flanke de la armitaj brakoj.

5. Nova papo.

En Mendo.

Promene sur kampo, mi renkontis du junajn seminarianojn en nigra sutano. Ili vigle interparolis. Mi aŭdis jenajn vortojn:

"- Ĉu vi scias, kiun ili elektis kiel papon?"

- Ne, Ĉu finiĝis la konklavo?"

- Jes. Divenu, kiu estas elektita.

- Ĉu eble la belga kardinalo..."

- Tute ne. Italo, kiel kutime.

- Kiu do?"

- Della Chiesa!

- Tiu german-amiko? Tiu..."

- Ĝuste li! Li alnomiĝis Benedikto XVa.

- Kaj al tia fiulo ni ŝuldas nun obeon!... kaj oni ekmirus, se iu forĵetus sian frokon kaj fariĝus anar..."

- Aŭ protes..."

La lastajn vortojn mi malnete perceptis en la ventobruo, dum la du junuloj malproksimiĝis.

Kiel ŝovinisma viruso povas infekti kaj endanĝerigi eĉ plej piajn animojn!

6. Unua aŭtuno.

1an de oktobro 1914.

Hodiaŭ okazis kiel kutime la reeniro en la lernejojn. En mia teknika gimnazio mankas pluraj el la plijunaj instruistoj, mobilizitaj. Jam du mortis en la unuaj bataloj: la instruisto pri historio kaj tiu pri geografio, bofilo de la direktoro.

Tiu ĉi, maljunulo kun blankaj lipharoj, altstatura, rekta, gravmiena, kunigis nin en la korto, kaj petis instruiston pri matematiko, kiu havas belan voĉon, paroli al ni. Ni aŭdis vibran paroladon pri patrio, gloro, venko... Dume mi rimarkis, ke alia, ankaŭ matematikisto, S-ro L., ŝajnis havi en la okuloj ironian duonrideton.

Poste ni vice eniris en niajn respektivajn klasĉambrojn. En mia prezidis la instruisto pri hispana lingvo kaj muziko, kvindekjarulo kun kalva kapo kaj pinta barbeto.

Li sidigis nin, mem sidiĝis ĉe sia tablo, kaj komencis paroli. Surda voĉo, sobra, senafekta tono. Tre simple, li diris pri siaj du mortigitaj kolegoj, kiujn ni konis lastan jaron, kaj tre ŝatis. Poste, pri du ekslemantoj, 21-jaraj, mobilizitaj en la unua tago de la milito. Pri ili venis neniu novaĵo. Ambaŭ estas oficiale malaperintaj. Versajne mortintaj.

"Mi revidas ilin antaŭ kelkaj jaroj: unu blonda, unu bruna, same gajaj, petolemaj. Ili sidis sur tiuj benkoj, en tiu kaj tiu lokoj..." Lia voĉo strangoliĝas, li ne povas daŭrigi. Li etendas la antaŭbrakojn sur sian tablon, metas sur ilin sian vizaĝon. Liaj ŝultroj estas skuataj de nevolaj movetoj.

La instruisto ploras.

En la klaso regas profunda, nekutima silento. La petolemaj buboj, senmove, retenas sian spiradon.

Ĝis la sonoro anoncanta la horfinon, la 50-jara instruisto ne relevis la kapon. En la klaso, neniu bruo, neniu movo. Tiel pasis por ni la unua horo de tiu lernojaro 1914-1915.

15an de oktobro 1914.

Post la "rezervo de la aktiva armeo" estis vokita la "teritoria armeo", kaj baldaŭ poste ties rezervo, el veteranoj kiel mia patro, 44-jara. Li ricevis militistan uniformon. Ĝi surhavas sur la kepo kaj sur la rekta kolumo de la jako la blankajn numerojn de la 117a teritoria regimento.

Li loĝas nun en la infanteria kazerno "Montcalm" en Nimo. Patrino kaj mi venis ĉe miajn geonklojn en tiu urbo. Ni ofte vidas lin, ĉar li ĝuas longajn libertempojn. Kiel serĝento, li dividas kun tri samgradaj "teritorianoj" suboficiran komunan ĉambron, en kiu restas neokupataj litoj. Hieraŭ vespere, interkonsente kun siaj kolegoj, li kunprenis nin, por ke mi tranoktu en unu el tiuj liberaj litoj.

Je la 21a, klarionsonoro anoncis la kontrolan nomvokadon en la soldataj ĉambregoj. Patro kaj mi restis ĉe malfermita fenestro, rigardante al interna korto. Estis belega stelplena ĉielo. Mi memoris la vortojn de Racino en versa letero sendita de Uzeso al siaj parizaj amikoj: "Kaj ni havas noktojn pli belajn ol viaj tagoj".

Subite, en la nokta silento, eksonis ĥoro.

Antaŭ kelkaj tagoj alvenis en la kazerno kontingento da "teritorianoj" el okcidentaj Pireneoj. Kun sia tipa parolmaniero, ili volonte diradas, ke ili estas senditaj "por plifortikigi la moralan forton de la XV-a korpuso"*.

Ĝenerale la beamanoj el Paŭo kaj la vaskoj el Bajono ne favore rilatas unuj kun la aliaj; la rivaleco inter ambaŭ urboj pliakriĝas per la provinca diferenco en lingvo, kutimoj kaj moroj. Sed ĉi tie, for de sia regiono, en komuna malŝato al la sudorientanoj, ili interproksimiĝis. Ĉiuvespere ili kunvenas en la korto por ĥore kanti alterne, la vaskoj en sia tute aparta idiomo, la beamanoj en sia okcitana dialekto, sufiĉe parenca de la nia por ke ni ĝin facile komprenu. Ĉiuj tiuj pireneanoj havas belajn voĉojn kaj denaskan talenton por plurvoĉa ĥoro. Estas vera plezuro, arta ĝuo ilin aŭskulti.

Je la 22a kaj duono la klariono sonoris la "estingon de la fajroj" (lumoj). La kantoj ĉesis, la ĥoranoj disiris al siaj dormejoj, kaj baldaŭ ĉiuj fenestroj mallumiĝis.

Neniel dormeme, Patro kaj mi restis kubutapoge ĉe nia vidposteno, ĝuante la mildon de tiu serena nokto. La malplena kvadrata korto estis banata en blua lunhelo. Absoluta silento...

Jen en la kadro de la pordego aperis grupo da militistoj kun blanka kepo: ili apartenas al la 1-a regimento de la Fremda Legio. La unua estas juna soldato; lin akompanas kaporalo kun bovtendeno en la mano; sekvas deĵorantoj de la militista polico. Certe la junulo estis kaptita de la patrolo pro tio, ke li senpermeso restis ekstere en la urbo, trans la tempolimo (21-a horo).

Nun li staras senmove kun mallevita kapo, kiel obstina mulo. "Antaŭen!" ordonis la kaporalo. La viro ne moviĝas, kvazaŭ li estus surda. La kaporalo levas sian bovtendenon, kaj frapas la dorson de

* Laŭ kalumnia legendo la soldatoj de tiu XV-a korpuso (sudorienta regiono) malkuraĝe kondukis dum la unuaj bataloj en Loreno, kie fakte tiu korpuso suferis tre gravajn perdojn el mortigitoj kaj vunditoj.

la spitanto*. tiu ĉi faras unu paŝon antaŭen, kaj denove haltas. "Marŝu!". Li restas senmova kiel statuo. Nova bato, nova paŝo; nova halto. Post ĉiu halto ni aŭdas la sonon de la bato sur la dorson. La trairado de la korto estas terure longedaŭra. Post tiel longa malobeado, kiu puno trafos tiun obstinulon?

Mia patro murmuris sub siaj lipharoj: "Ho disciplino, "kiu faras la forton de la armeoj!"**

.....

La 6-an de oktobro la germanoj ekokupis la grandan havenurbon Antverpeno, kiun Napoleono nomis "pistoło celdirektita al la koro de Anglio".

Nun la maro estas atingita. De ĝia bordo ĝis la svisa limo, sur 800 km, etendiĝas la seninterrompa linio de la kontraŭe starantaj armeoj. Furiozaj bataloj okazas en Flandrio, kie urboj kaj vilaĝoj estas alterne perditaj kaj reokupitaj - kaj dume, kompreneble, grandskale detruitaj.

Sur la tuta cetera fronto ŝajne komenciĝis pozicia milito kun artileriaj dueloj kaj disa aktiveco de malmultopaj patroloj, sen alia rezulto ol ĉiutaga kvanto da vundoj kaj mortoj.

* En la normala franca armeo la batpunoj estas severe malpermesitaj, sed ili estis kutime aplikataj en la fremda legio, kiel ankaŭ en la "disciplinaj trupoj" ("afrikaj batalionoj"), kaj al indiĝenaj soldatoj en la kolonioj.

** Citaĵo el la franc-armea regularo.

II. 1915

1. Printempo en militanta lando

.....

La batalantoj pasigis la tutan vintron en la ega malkomforto de la tranĉeoj. Ili ne plendas; eĉ multaj pretendas, ke tiuj vivkondiĉoj estas sanigaj, ke ili nun fartas pli bone ol iam ajn. Ĉu ili tiel diras por trankviligi sian familion? Cetere, ili estas tre kuraĝaj kaj disciplinitaj.

25an de marto.

Nun mia patro estas for, en nordo, proksime de Amieno, kiel estro de taĉmento, kiu gardas fervojan sektoron. Tie li vivas trankvile en agrabla vilaĝeto. Li sendas al ni longajn leterojn, al mi en esperanto, kaj li komencis desegno-libreton, en kiu li krokizas pejzaĝojn de tiu ebena regiono kun belaj arbaroj kaj verdaj kampoj.

Iafoje li vizitas apudan vilaĝeton, en kiu li konatiĝis kun esperantista apotekisto, kaj la urbon Amieno. Li sendis poŝtkartojn kun bildoj de la belega gotika katedralo.

Foje li aŭdas kanonbruon el la proksima fronto. Li vidis pasi zepelinojn, kaj iam estis spektanto de aerbatalo inter aviadiloj. Tamen, almenaŭ tra siaj korespondaĵoj, li ne ŝajnas en granda danĝero. Tiel daŭru!

...en Arlezo.

Sur la larĝa avenuo laŭlonge de la promenejo "Lices" mi vidis pasi eskadronon da marokaj *gum'anoj**. Kiom elegante ili rajdis sur siaj karakolantaj ĉevaloj!

Sed... kio estas tio? Ĉu mi songas? Inter la blankaj turbanoj kaj la ruĝaj manteloj, tiuj du nigraj ĉapoj el astrakan-pelto, tiuj du grizverdaj tunikoj kun oblikvaj kartoĉingaj rimenoj ambaŭflanke sur la brusto... ĉu ne kozakoj?

* "gum": kavaleria trupo el volontuloj varbitaj de la franca armeo en la nordafrikaj kolonioj kaj protektoratoj.

Efektive: tiuj du rajdistoj estis kaptitaj ĉe la rusa fronto. Transportitaj en okcidentan Germanion, ili sukcesis, malgraŭ sia tiel okulfrapa uniformo, eskapi kaj transiri la landlimojn tra Svisio. Nun ili ekzerciĝas tie ĉi kun la arabaj kavalerianoj, antaŭ ol reiri al batalo kontraŭ la komuna malamiko.

.....

Hieraŭ mi vidis aliajn rusojn en Marsejlo.

La urbego ĉiam prezentas ekzemplerojn de plej diversaj tipoj kaj kostumoj el ĉiuj landoj de la tero. Nun svarmas en ĝi bunta amaso el uniformoj de ĉiuj aliancaj armeoj: serbaj, belgaj, anglaj... La britaj oficiroj en kaki-vesto, kun eleganta bastono en la dekstra mano, promenas sur la trotuaroj per longaj malrapidaj paŝoj. Ĉiuj uniformoj de la francaj kaj koloniaj armeoj; inter ili, aparte rimarkindaj, la alĝeriaj "*spahi*"* kun alta turbano kaj du grandaj supermetitaj manteloj el lanaĵo, blanka kaj ruĝa.

Ankaŭ kelkaj italoj, kvankam ilia nacio restas, ĝis nun, neŭtrala inter la du aliancaj blokoj. Tiuj forpermesite vizitas parencojn, ĉar en tiu ĉi kosmopolita urbo vivas multopa itala loĝantaro: zuavoj iel similaj al la francaj, kun pli longa ŝeŝio; "*bersaglieri*" kun nigra tufo el kokvostaj plumoj sur la verda ĉapelo. Kaj maristoj el plej diversaj flotoj, aliancaj kaj neŭtralaj.

Tagmeze, pasante proksime de la Prefektejo, mi troviĝis enmiksita en granda amasmovo. Mi scivole proksimiĝis, kaj ĉeestis imponan paradon. Unue, granda muzikistaro - fifroj, tamburoj, kupraj instrumentoj. Poste, perfekte ordigitaj en larĝaj linioj, po dudekelkaj viroj en ĉiu, defilis en malrapida takto altstaturaj blondaj soldatoj en longa grizverda surtuto, kun nigraj botoj, kapvestitaj per plataj kaskedoj kun mallarĝa viziero sur la frunto. Tio estis la unua taĉmento de la rusa ekspedicia korpuso en Francio. Enŝipiĝinte en Arkangelsko, ili navigis tra Arkta Oceano kaj Atlantiko, pasis en Mediteraneon tra la markolo Ĝibraltara, kaj fine albordiĝis ĉe Marsejlo.

La amaso fervore aklamis tiujn amikojn, kiuj venas de tiel malproksime por kunbatali apud niaj soldatoj. Post la parado repasis en senkovraj aŭtomobiloj, kune kun francaj kolegoj, la rusaj oficiroj, starantaj kaj salutantaj la ĉeestantaron, kiu senhalte aplaudadis.

Sendube, ankaŭ tiuj oficiroj kaj trupanoj, same kiel niaj en lastjara aŭgusto, imagas, ke ili ĉiuj, venkinte, revenos.

* Nordafrikaj kavalerianoj (turkdevena).

..... en Arlezo.

Nun ĉiutage pasas longaj trajnoj transportantaj de Marsejlo al nordo soldatojn en kacia uniformo, kapvestitaj per grandaj turbanoj. Belaj viroj brunhaŭtaj, kun larĝaj nigraj okuloj kaj nigraj krispaj barboj. Ili venas de Hindio, tie rekrutitaj de la angla armeo, kaj ĝuas famon de bravegaj batalistoj.

Jam batalas sur nia fronto negroj el Senegalo, same famaj pro sia kuraĝo kaj impeto.

Kiel nia eŭropa konflikto koncernas tiujn aziajn kaj afrikajn popolojn? Pro kio tiuj homoj mortigas kaj mortas?

2. Viroj el Tunizio

11an de aprilo 1915, en Aleso.

Antaŭ kelka tempo alvenis nordafrikaj "tirajloroj" el du tuniziaj regimentoj, kiuj antaŭe garnizonis en Arlezo kune kun marokaj.

Kvankam Tunizio kaj Maroko estas ambaŭ protektoratoj, la militista statuto de la nacioj estas diferenca: en la unua regas konskripcio kiel en Francio kaj Alĝerio, dum la marokanoj estas volontuloj, kaj tial ricevas pli altan soldon. Tio naskis ĵaluzon, intergentajn kverelojn, interbatiĝojn, kaj fine verajn militetojn inter batalaranĝe kontraŭstaraj grupoj. Oni elingigis la bajonetojn, kaj elŝiris pavimerojn kiel ĵetarmilojn.

Post kiam estis pluraj vunditoj (iuj eĉ parolis pri mortaj vundoj), la komandantaro vokis el Taraskono eskadronon da husaroj por disigi la malamikajn fratojn. Tuj post rekvietaĝo, la tunizianoj estis senditaj en Aleson, dum la marokanoj restis solaj en Arlezo.

De mia monata restado en Tunizio, antaŭ tri jaroj*, mi konservis simpation al tiu popolo, el kies lingvo mi memoras kelkajn vortojn kaj esprimojn. Mi volonte alparolas ilin, kaj ekrlatis kun pluraj. Hieraŭ mi invitis 35-jaran kaporalon Mohamedon por trinki kafon en nia hejmo. Li estas ĝentila kaj lojal-aspekta. Li parolis respektoplene al mia patrino, kaj al mi li donis konsilon: "Ne fidu sendistinge al araboj; ne ĉiuj estas honestaj kaj fidindaj."

Mi miras, kaj ne komprenas: ĉu do unu el ili konfirmas la dirojn de nordafrikaj francoj, laŭ kiuj la araboj estas mallaboremaj, ŝtelemaj kaj mensogemaj? La plimultaj el tiuj soldatoj estas simplaj kamparanoj. Ili ŝajnas al mi naivaj kaj senartifikaj. Mi cerbumas, vane.

* Vd. "...el la kara infaneco" § XI, 6.

8an de majo 1915.

Kaporalo Mohamedo foriris al la fronto.

Nun mi komprenas la sencon de lia averto. Kiel naiva mi estis!

Antaŭ tri tagoj mi promenis vespere kun unu juna tirajloro. Pasante en malluma strato, dum ni estis solaj, li malbutonis sian pantalon-fendon, eligis sian ŝvelan rigidan sekson, prenis mian manon kaj flustris: "Tuŝu!". Mi retiris mian manon kaj ekridis, ŝajnigante, ke mi rigardas lian geston kiel nuran ŝercon, kaj li ne insistis.

La morgaŭan vesperon mi denove renkontis lin. Ni kune promenis, sen aludo pri la antaŭtaga okazo, sed mi evitis la mallumajn stratojn. Fine, akompaninte min ĝis hejme, li petis, ke mi akceptu lin en mia ĉambro kaj en mia lito. Tiam mi rifuzis pli serioze kaj energie, kaj decidis ne plu revidi lin. Li foriris, tre malgaja. Mi kompatis lin, sed tamen!...

Kaj hieraŭ post vespermanĝo, irante al desegno-kurso, mi renkontis alian tunizianon el miaj konatoj. Ĝis nun, tiu ĉiam dece sin tenis.

Li akompanis min ĝis la pordo de la lernejo. Kaj tie, subite, li forte ĉirkaŭbrakis min, kaj premis siajn lipojn al miaj. Surprizite, mi per luktista evitmovo de la antaŭbrakoj kaj kubutoj malstreĉigis la stringon kaj repuŝis lin. Mi eliĝis el lia brakumo, kolere viŝis mian buŝon, kaj forkuris sur la ŝtuparon.

Nun mi provas analizi mian senton kaj mian sintenon. 15-jara knabo, mi estas ĉasta, pro fideleco al mia neforgesita infana amo*. Tamen iafoje, en ĉeesto de knabino aŭ virino, leviĝas en mia juna korpo instinkta deziro. La ina ĉarmo ekkaptas miajn sentumojn kaj emocias min. Sed al intimaj ludoj kaj karesoj inter virseksuloj mi neniel inklinas. Kun kelkaj knaboj mi havas rilatojn de pura vira amikeco. La nura penso pri samseksa amoro naskas en mi naŭzon.

Tia mi estas, aliajn mi ne malŝatas. Mi ne kondamnas ilin, mi indulgas, sed helpi mi vere ne povas.

De nun, konforme al la averto de Mohamedo, mi estos pli singarda en rilatiĝo kun tiuj soldatoj, kvankam mi konservas al ili tutan mian simpatian.

* Vd.: "...el la kara infaneco" § XII, 3.

3. Patro al fronto.

15an de junio 1915.

Finiĝis nia trankvileco.

Patro revenis por du tagoj. Tute helblue vestita; kun etaj, preskaŭ nevideblaj galonoj sur la manikoj. Li estas ĵus promociita al la grado de adjudanto. Li reiros al nordo, en alian sektoron de la "zono de la armeoj".

Kiam ni troviĝis ambaŭ solaj, li gravmiene alparolis min: "Al vi filo, mi diros la tutan veron: ĉi-foje mi iras al la fronto, en la tranĉeojn. Eble iam mi devos partopreni en batalo. Kiel adjudanto, mi estas armita per revolvero. Sciu, ke neniam ĝi estos ŝargita. Tion mi promesas al mi kaj al vi."

5an de julio 1915.

Nun mia patro estas en regiono, kiun li ne rajtas precizigi. ; sed li ĉiam estis elturniĝema: en siaj leteroj li uzas akrostikojn por informi nin spite la eventualajn cenzuristojn. Tiel ni scias, ke li troviĝas oriente de Verduno, en la triste fama sektoro "Les Eparges" - feliĉe nun relative kvietaj. Relative... ni ja konjektas, kion tio signifas.

Post pluraj fiaskaj atakoj de unu kaj alia flanko, la pozicioj restas proksimume senmovaj. La oficialaj komunikaĵoj raportas nur pri kelkaj renkontoj inter patroloj kaj pri artileria aktiveco - kiu ĉiutage kaŭzas vundojn kaj mortojn en ambaŭflankaj artilerioj kaj infanterioj.

La fronto nun konsistas el profundaj retoj de tranĉeoj, "paralelaj" kaj "komunikaj". En la paralelaj unualiniaj, ŝirmataj per domodratoj kaj aliaj obstakloj, la infanterianoj gvatadas ĉe parapeto kun kreneloj turnitaj al la malamikaj pozicioj. Ili dormas laŭvice en subteraj ŝirmejoj, ofte en la bruego de kanonpafadoj. Post kelke da tagoj (iafoje post pluraj semajnoj), tra la komunikaj tranĉeoj, aliaj venas por anstataŭi ilin ĉe la gvatpostenoj. Tiam ili iras laŭ la sama vojo al malantaŭaj lokoj por kelktaga ripozo.

Tiuj komunikaj fosaĵoj estas proksimume perpendiklaj al la "paralelaj", sed zigzagaj, por eviti rektajn pafliniojn. Ili servas ankaŭ por la portado ĝis la unua linio de la nutraĵoj (kiuj ofte alvenas malvarmaj, kiam ili alvenas), de la municioj, de la korespondaĵoj; por meti telefondratojn; por transporti vunditojn al flegtendoj, en kiuj ili atendos eventualan elsendon per trajno al la interna lando; ankaŭ, foje, por transporti mortintojn al la postfrontaj tombejoj. Tie, de tago al tago, etendiĝas vastaj ebenaĵoj kovritaj de lignaj krucoj.

La reto de la ambaŭflankaj fosaĵoj konsistigas gigantajn sistemojn de fortikaĵoj, kiuj okupas vastegan teritorion. Sur ĝi jam ne vidiĝas kultivitaj kampoj; en la iamaj arbaroj, la trunkoj, falĉitaj per obusaj splitoj, fariĝis similaj al la stumpaj kolonoj de ruinigitaj temploj.

En tiu funebr-aspekta pejzaĝo, en tiu kvazaŭ ekstermonda regiono, en kiu oficiale okazas nenio notinda, junaj kaj malpli junaj viroj mizere vivaĉas. Ili suferas pluvon, malsekecon, koton, vintre neĝon kaj froston*, somere fetorajn haladzojn, kunvivadon kun ratoj, malpurecon, pedikojn, ofte la inferan bruon de bombardado - kaj ĉiutage kelkaj vundiĝas, kripliĝas aŭ mortas.

Tie vivas nun mia patro!

Kaj tri el miaj onkloj; kaj pluraj kuzoj, inter ili Fernando, 26-jara, kiu estas al mi kiel pliĝa frato. En 1914 li ĵus finis sian trijaran soldatservon, kaj li devis ree surmeti la uniformon. Li partoprenis en la unuaj bataloj en Loreno, poste ĉe Izero en Belgio, poste en Ĉampanjo... Kian junecon li memoros - li kaj multaj, multaj samtempuloj!

4. "Viluloj" kaj civiluloj.

4an de aŭgusto 1915.

Jam unu jaro. Kie estas la du, tri semajnoj antaŭviditaj eĉ de pesimistoj? Nun neniu plu riskus profeti baldaŭan finon. Forvapor-iĝis la iluzioj. La lando instaliĝis en longedaŭra milito. La oficiala propagando per gazet-artikoloj, afiŝoj, paroladoj, paradoj, falas en indiferecon.

La armitaj taĉmentoj, kiuj iras al la stacidomo por veturi al la fronto, antaŭataj de la tipa araba muziko, la nostalgia "nuba", jam ne vekas entuziasmon nek scivolan intereson. La pasantoj apenaŭ rigardas, kaj ne akompanas ilin.

La popolo fariĝis pasiva en ĉiuj sencoj. La voĉo de la granda eŭropano Romain Rolland, kiu vivas en Svislando "super la miksbatalo", ne ricevis grandan eĥon en la militantaj landoj. Ankaŭ ne tiu konferenco en la svisa urbeto Zimmerwald, kiu kunigis socialistojn kaj sindikatanojn el tuta Eŭropo, vokis al "paco sen aneksoj kaj sen monkompensoj", kaj finis sian alvokon per la moto de la Komunista Manifesto: "Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!". Por tiaj ideoj la mensoj ne estas maturaj. La koroj ne vibras plu por glora venko de la patrolando, sed ili ne flamiĝas por la paco.

* Kelkaj estis trafitaj de piedfrostiĝo, kaj pluraj devis esti amputitaj.

Ĉiu apatie ricevas la faktan staton kiel fatalaĵon.

Ankaŭ la batalantoj rezignacie akceptas sian teruran kaj monotonan ekzistadon. Senmova restado ĉe gvat-kreneloj aŭ en humidaj kavaĵoj, alternaj ripozperiodoj en malantaŭfrontaj vilaĝoj, pli-malpli detruitaj, kie ili elspezas sian magran soldon, priŝtelate de cinikaj fikomercistoj.

Ili pacience eltenas. Kiel la grenadistoj de Napoleono, ili grumbias, sed marŝas kaj obeas. Malgraŭ ĉio, ili konservas solidan moralforton kaj bonhumoron. Multaj lasis kreski sian barbon, simbolon de vireco. Kun aŭ sen barbo, ili sin mem nomas "la Viluloj". Iom post iom ili distingigĝas disde la cetera homa speco, kvazaŭ ili konsistigus apartan rason.

Ili tiel kutimiĝis, ke ŝajne ili eĉ ne sopiras al paco. Ilia ambicio limiĝas al restado en "trankvila sektoro", foje al "bona vundo", ne tro grava, sed sufiĉe por sendigi ilin por ioma tempo al hospitalo for de la tranĉea infero: al ripozo inter blankaj littukoj, al mildaj manoj kaj dolĉa rideto de ĉarmaj flegistinoj. Modesta revo de senkulpaĵ malbenitoj.

- en Mendo, 20an de aŭgusto.

Hieraŭ, longa trajno kun ruĝaj krucoj sur la vagonoj haltis ekster la stacidomo, proksime de la seminariejo transformita en militistan hospitalon. Sur brakportiloj oni transportis kuŝantajn virojn en uniformo, kun bandaĝo ĉirkaŭ la kapo aŭ iu membro, foje kun ruĝaj makuloj. Korkreviga spektaklo!

Hodiaŭ mia patrino aĉetis belajn pomojn kaj pirojn, kaj komisiis min por disdoni ilin al vunditoj. Mi pasis inter la litoj kun timemo antaŭ tiuj herooj, kiuj afable akceptis mian simplan donacon.

Sur unu el la litoj, apogite ĉe kuseno, sidis junulo kun kavaj vangoj kaj febraj okuloj. Apude sur seĝo, bela junulino. Ili havis seriozajn mienojn, kaj vigle interparolis. Proksimiĝante mi aŭdis ilian konversacion. Temis pri literaturo kaj filozofio, mi ekkaptis la nomon Niĉeo. Mi devis pasi kaj proponi miajn fruktojn, mi apenaŭ kuraĝis. La junulo ekvidis min, ne povis reteni malpaciencaĝon, kaj abrupte, kvankam ĝentile, diris: "Dankon! Metu ĉi tien!". La fraŭlino tute ne atentis min.

Mi daŭrigis mian iradon, malkontenta: ne pro ili, sed pro mi mem, kiu ne estis sufiĉe lerta por diskrete respekti ilian apartiĝon.

Nun mi repensas pri tiu sceneto. Do, vilulo, kiu spertis en la tranĉeoj tiel aĉan vivadon kaj nun suferas en sia karno, povas troviĝi en kompanio de ĉarma virino kaj ankoraŭ interesiĝi pri aliaj

aferoj ol flirto kaj sekso - pri pure intelektaj temoj. Kiajn latentajn eblojn konservas en ĉiaj cirkonstancoj la homa spirito!

5. Grandaj eventoj.

.....
Dum la operacoj stagnis sur la franca fronto, sur aliaj okazis vastaj movoj.

Komence la rusaj armeoj, kiel nehaltigebla premcilindro, invadis orientan Prusion kaj sturme celis al Berlino. Sed baldaŭ ili estis tamen haltigitaj kaj repelitaj. La germanoj penetris en rusan Polion kaj Litovion.

Poste la rusoj direktis sian atakon al sudo, atingis Karpatojn kaj minacis Hungarion. Sed en majo 1915, aŭstra-germana kontraŭ-ofensivo reokupis Varsovion. Tiam, liberigite de la danĝero el nordo, ili turnis siajn fortojn kontraŭ Serbion (kiu, fine de 1914 estis reokupinta sian ĉefurbon Belgradon). En tiu sama tempo ĝin atakis la bulgaroj, kaj la greka reĝo Konstanteno rifuzis helpi sian serban kunliganon. La malgranda regno, sub premeĝo de du flankoj, estis denove invadita.

En februaro angla-franca floto celis atakon al Konstantinopolo tra la Dardanela markolo (la turkoj proklamis militon al Rusio en antaŭa novembro). Trupoj elŝipiĝis sur la Gallipoli-duoninsulon. La potenca turka artilerio dronigis plurajn kirassĵipojn kaj haltigis la infanterion. La markolo ne estis trapasita, la tuta afero saldiĝis per sanga fiasko.

Ĉu tiuj grandaj movoj akcelos la iradon al fino? Ĉu decide influos la pezo de Italio? Se ĝi estus fidela al sia alianco, ĝi devus militi flanke de la centraj imperioj - sed ĝi restis neŭtrala. Multaj italoj simpatias al Francio, kaj jam en aŭgusto 1914 kelkaj, sub gvidado de la nepoj de Garibaldi, varbiĝis en nia fremda legio. En la lando, patriotoj ekvidis favoran cirkonstancon por rekonkeri la ankoraŭ ne liberigitajn provincojn: Triestion, Trention. Ili agitadis, kaj fine sukcesis: en majo Italio proklamis militon al Aŭstrio. (Tamen ne al Germanio. La italaj registoj havas subtilan komprenon pri nuancoj, kaj estas singardemaj).

Ŝajne tiu decido vekis en la itala popolo entuziasmon similan al tiu, kiu ekflamis ĉe ni en aŭgusto 1914. Ĉu do la ekzemplo de aliaj neniom utilas?

Inter la plej fervoraj agitintoj, nun triumfintaj, estas la granda lirikisto Gabriele d'Annunzio. Tiu paranojulo patose ekkriis: "Feliĉaj tiuj, kiuj havas dudek jarojn, korpon harditan, animon ĉastan,

patrinon kuraĝan!" Oni do ne ligas kaj silentigas la danĝerajn frenezulojn?

Sumare la anglaj kaj francaj eskadroj venkis la militistan floton de Germanio, grandparte kaptis ĝian komercan ŝiparon, kaj okupis preskaŭ ĉiujn ĝiajn koloniojn. La germanoj rebatis per efika submara milito. Iliaj torpedoj detruas multajn ŝipojn, eĉ neŭtralajn, kiuj transportas trupojn, municiojn, diversajn varojn, foje ankaŭ civilajn vojaĝantojn. De tio rezultas fakta blokado, kies konsekvencoj ambaŭflanke sentiĝas.

6. Ĉiutaga vivo for de la bataloj.

12an de novembro 1915.

Ĉe ni kiel en Germanio, nun mankas multaj varoj, kaj ĉiuj pli multekostiĝis.

Jam longe, multaj domoj estis senigitaj je la salajro de la familiestro. La edzinoj de la batalantoj ricevas de la ŝtato mizeran mon-asignon. Ili devas barakti por nutri kaj vesti siajn infanojn, kaj ili elprenas monon el siaj propraj bezonoj por sendi al siaj viroj pakaĵojn kun nutraĵoj, bonaj ŝuoj, varmigaj vestoj (jako, ŝtrumpoj, ĉapoj) el trikita lano: ĉiuj virinoj multe trikadas.

Sukero rariĝis, kaj kafo, tiel franda al francaj virinoj. Oni trinkas malbongustajn surogatojn dolĉigatajn per sakarino. Tabakon ricevas en sufiĉa kvanto la soldatoj; aliaj montras fekundan imagovon por inventi ĉiajn fetorajn fumeblaĵojn.

Antaŭe ni vivis sen lukso, sen granda komforto, sed en relativa facileco. Mi ne havis la impreson, ke miaj gepatroj bezonas tre zorgi pri mono. Nun mi vidas, kiel mia paptrino devas atenti pri la ĉiutagaj elspezoj kaj ŝpari en ĉiu okazo. Mi helpas ŝin laŭ mia eblo. Mi vicatendas ĉe la urbaj magazenoj kreitaj de la magistrato. Tie manĝovaroj estas vendataj je pli moderaj prezoj ol en la privata komerco.

Eĉ en nia mina regiono karbo fariĝis multekosta. Anstataŭe, ni bruligas lignon. En fabriko de kestoj por municioj vendiĝas ligno-defalaĵoj, pecoj de diversaj formoj kaj grandoj. Por kvin soldoj* oni rajtas plenigi grandan sakon. Mi serĉis plej grandan, kaj plenŝtopas ĝin kiel eble plej streĉe. Mi portas ĝin sur la dorso. La sako estas peza, la eĝoj tra la ŝtofo dolorigas. Mi kontente portas al la patrino

* 25 centimoj.

tiun malkaran (kaj malgrandvaloran) hejtaĵon. Mi zorges tenas min informita pri la tagoj, en kiuj okazas tiuj vendoj - fakte preskaŭ senpagaj disdonoj - kaj ne preterlasas iun el ili.

En la ĝardeno ame kultivita de mia patro, kaj devige forlasita, mi plantis kaj rikoltis kelkajn laktukojn, pizojn, brasikojn, fazeolojn, spinacojn, terpomojn, feliĉe, estas aĉeteblaj ne multekoste. En aŭtuno mi kolektis fungojn en la proksimaj arbaroj. La bona amiko Klaŭdius ofte donacas al ni legomojn kaj fruktojn el sia ĝardeno.

Patrino kaj mi zorgas pri niaj vestaĵoj, ke ili longe daŭru. Ŝi kudras kaj flikas, kaj mi tenas la ŝuojn ĉiam bone ciritaj aŭ ŝmiritaj.

Entute, ni ne estus malfeliĉaj - se nur ne pezus sur ni tiu daŭra maltrankvilo pri la sorto de la patro...

7. Intermezo.

24an de novembro 1915.

Patro alvenis forpermeso por ses tagoj. Li demetis sian ŝtalan kaskon kaj sian uniformon. Post duŝo kaj mallonga dormo li sin vestis civile, kaj iris kun mi tra la urbo.

Al ĉiu renkontato, kiu demandis: "Kie vi nun estas?", li respondis koncize: "Ĉe la fajro", kaj tuj ekparolis pri alia temo.

Mi jam rimarkis, ke la viluloj ne volonte rakontas pri siaj militaj spertoj. Se iu insiste demandas, ili respondas, preskaŭ malafable: "Vi ne povus kompreni. Vi ne povas imagi". Kaj ili silentas, aŭ ŝanĝas la konversacion.

Kiam estis anoncigitaj tiuj sestigaj forpermesoj "por malstreĉiĝo", granda ĝojo leviĝis ĉe la batalantoj kaj iliaj familioj. La "permesuloj" per indianaj ruzoj, fraŭdante la severan militistan kontrolon, sukcesis plilongigi la restadon je du aŭ tri tagoj - paradizaj tagoj antaŭ refalo en inferon.

Tamen ilia sinteno ofte vidigas ian elreviĝon. Kvazaŭ ili nun sin sentus fremdaj en tiu ĉi lando, tiel malsimila je la senhorizonta vivejo, en kiu ili familiariĝis. Jam en la vagonoj: en siaj malpuraj batalvestoj, kiuj eble enhavas pedikojn, ili apudas pure, iafoje elegante vestitajn ĝecivilulojn, kaj ĝenate rigardas ilin. Tiuj, same ĝenate, duonkaŝe sin tiras en siaj anguloj.

En la urboj, precipe se ili trapasas Parizon, la venantoj el la fronto trovas neatenditan etoson. Ilin ŝokas la aroganta lukso de la milit-profituloj: industri-mastroj, grand-komercistoj, proviantistoj de la armeoj. Ilin spitas la pimpa kostumo de la "embuskantoj"*.

* Oni kromnomis "embuskantoj" tiujn mobilizitojn, kiuj per protekto ricevis sendanĝeran postenon for de la fronto.

Ilin indignigas la okulfrapa diboĉo de tro multaj virinoj kaj knabinoj. Foje iu "permesulo" retrovas sian edzinon graveda, kaj la komparo de la datoj ne lasas dubon: la naskota bebo ne estos de li.

Krom tiuj ekstremaj kaj esceptaj okazoj, ofte la viro jam ne sentas sin hejme en la retrovita domo familia. La forgesita komforto ne konvenas plu al liaj nove akiritaj kutimoj: en mola lito li malbone dormas. Kun siaj parencoj, eĉ plej proksimaj, li ne interkomprenas: ili ne parolas la saman lingvon. Fine, kelkaj preskaŭ sopiras al reveno inter siajn kunbatalantojn, en la vira kamaradeco de la tranĉeoj; nemulte mankus, ke ili plifruigu la finon de la forpermeso.

Aliaj, male, vidas kun teruro proksimiĝi la tagon de la reveturo al la fronto. En la lasta minuto ili ekkrias: "Kio ajn okazu, mi ne volas reiri tien!". Kaj ploranta edzino, patrino, fratino aŭ fianĉino, kun krevanta koro, devas preskaŭ perforte puŝi la amaton al la vagonaro, kiu lin forŝiros de iliaj brakoj.

Kio povus pli evidentigi la malhumanecon de tiu ĉi tempo?

1an de decembro 1915.

Hodiaŭ matene Patro sin duŝis, sin razis, prenis al si purajn ŝtrumpetojn, gladitajn tolaĵojn, kaj surmetis sian helbluan uniformon zorge purigitan. Jam je lia alveno antaŭ sep tagoj ni konstatis, ke li maldikiĝis kaj bruniĝis, sed prezentas entute bonfartan mienon. "Tiu restado en libera aero estas saniga.", li diris. Tio estis lia sola aludo pri la vivo en la tranĉeoj. Hodiaŭ, bone ripozinta, li havas junecan aspekton kun siaj lipharoj sen unu blanka ero. Tamen li estas nun 45-jara; kaj, kiel diras la viluloj, la militjaroj estas duoble kalkulendaj - sed sur li tiu prova tempo glitas sen videbla spûro.

Patrino kaj mi akompanis lin al la stacidomo. Ĉe la disiĝo sur la kajo, neniu ploris. Li kisis nin, supreniris en vagonon, fermis la pordon, sin apogis al la fenestro-bordo, kaj parolis ankoraŭ kelkajn vortojn per firma voĉo.

La trajno ekmoviĝis. Patro adiaŭis nin per facila mangesto, kaj ridetis al ni. En tiu lasta momento li volis lasi ĝojan bildon en nia memoro.

En la malplena stacidomo, Patrino kaj mi restis ankoraŭ plurajn minutojn, post kiam foriris ĉiuj aliaj personoj. Poste ni revenis malrapide, en silento, sub la plumbe griza ĉielo.

Jen la strato, la domo, la ombra koridoro, la ŝtuparo. Ni puŝis la

pordon. La loĝejo ŝajnis al ni frosta, malgajega, kvazaŭ malamika. Dolora estis la vizaĝo de Patrino. Mi proksimiĝis, kaj senvorte kisis ŝin. Tiam niaj okuloj ellasis la longe retenitajn larmojn.

Miksité de antaŭtimoj kaj malgajaj pensoj, tiu semajno tamen estis entute feliĉa. Kiel rapide ĝi pasis! Ĉu ne bela sonĝo? kaj nun la kruela vekigo!

De nun, ĝis kiam? Kiam la venonta revido?

Ho Patro, Ĝis kiam?...

8. Dua vintro.

21an de decembro 1915.

Unua tago de la dua vintro.

Fakte, en la nordaj regionoj, jam komenciĝas tiu sezono aparte malmilda kaj peniga por la batalantoj, eĉ kiam ili ne batalas.

La oficialaj komunikaĵoj mencias nur kelkajn renkontojn kaj interbatojn inter patroloj, kelkajn atakojn de gvat-postenetoj, la kutimajn artileriajn duelojn, kaj aldonas: "Sur la cetero de la fronto, nenio notinda". Eĉ, iajoje, la raporto konsistas el nur tri vortoj: "Nenio por noti". Samtempe ni povas legi en svisaj gazetoj simetrian raporton de la germana ĉefstabo: "En okcidento nenio nova".

Nenio nova, certe: ne nova estas la ĉiutaga kontingento da vundoj kaj mortoj. Kiel ofta estas la ekscio, ke falis soldato el iu konata familio! Kiel ofte, en ĉiu urbo aŭ vilaĝo, oni vidas la magistratestron, aŭ ties reprezentanton, kun malgaja vizaĝo eniri per ŝanceliĝa paŝo en iun domon - kaj la najbaroj jam scias, kion tio signifas: li venas por informi, ke la filo, aŭ la patro, "mortis sur la honorkampo". Kaj jen estas unu plia familio en funebro, unu plia vidvino, kelkaj pliaj orfoj.

Tio okazis ĉe niaj sametaĝaj najbaroj: juna paro, bela paro da geamantoj; plie ĝojigita per ido, kiu ĵus naskiĝis, kiam la edzo foriris al milito. Li apenaŭ ekkonis sian filon, kaj tiu ĉi neniam konos la patron, krom pere de fotoj kaj rakontoj de la patrino. Ŝi, 25-jara, restas sola kun tiu frukto de ilia amo. Ŝi ricevos pension de la ŝtato, sed kio povus redoni al ŝi la edzon, la familiestron, la karulon, la amanton, la patron de ŝia naskito?

Mi iris kun la juna vidvino al la kesto-fabriko por provizi nin per hejtoligno, dum mia patrino vartis ŝian bebon. Diligente kolektante lignopecojn, mi vidis ŝin tre proksime. Ŝia bela vizaĝo estas eĉ plibeligita de la nigra vestaro. Antaŭe ĉiam gaja, ĝi nun esprimas

senfinan doloron. Neniam ŝi ridas, neniam mi vidis ŝin plori. Mi admiras ŝian kuraĝon, kaj mi estas konsternita de ŝia malfeliĉo. Mi dezirus preni ŝiajn manojn, kaj kisi ŝin kiel mian patrinon, sed mi ne povas - estus ne dece; ŝi estas ja tiel juna, kaj mi aspektas jam tro virece kun miaj ekkreskantaj lipharoj.

25an de decembro.

Lastan jaron, kvankam mobilizita, Patro povis pasigi kun ni hejme la kristnaskan tagon. Ni ne festenis nek festis, sed ni estis kune, do tamen feliĉaj. Ĉi-jare, la unuan fojon en mia vivo, li forestas - kaj kie li estas?

Ni neniel solenas tiun malgajan festotagon. Ni estas certaj, ke nia amato ne preterlasis la okazon, ke li sendis leteron aŭ poŝtkarton sufiĉe frue, por ke ni ĝin ricevu ĝustatempe - sed ĝi ankoraŭ ne alvenis. Almenaŭ ni scias, ke kie ajn, en kiaj ajn kondiĉoj, li pensas pri ni, kiel ni pensas pri li.

III. 1916

1. Verduno.

10an de marto 1916.

Jam kelkajn semajnojn antaŭe, oni sciis: en la Verdun-regiono, sub komando de la kron-princo koncentriĝis amaso da infanteriaj trupoj kaj kanonoj el ĉiuj kalibroj: de la rapidpafaj 77-milimetraj kaj aŭstraj 88, rivaloj de nia fama 75, ĝis la longtraf-povaj 320 kaj 380 de la marmarmeo, kies obusojn la viluloj nomas "marmitoj". Siaflanke la franca komandantaro haste sin pretigis por kontraŭi grandstilan ofensivon.

Ĝi komenciĝis la 21an de februaro. Unue, longedaŭra, drasta, preciza artileria preparado. Dum horoj kaj horoj, densa hajlo da obusoj falegis kaj eksplodis sur la fortikaĵoj kaj la francaj pozicioj norde de la urbo. Poste, freŝaj infanteriaj kolonoj impete eksturmis, atingis kaj transis la unuajn liniojn. Sin sekvis atakoj kaj kontraŭ-atakoj, kaj re-atakoj. Baldaŭ ne restis ia ebla dubo: la batalo por Verduno estas komencita.*

La furiozaj sturmatakoj de la kronprinca armeo celas la urbon de norde, sed la artileria pistado premezas ankaŭ la orientan flankon, sur tiuj Moz-valaj altaĵoj, kie estas mia patro. En terura fajr-artaĵo kaj tondrado, la tuta urba kaj ĉirkaŭanta regiono ricevas diluvon da fero. La obusaj eksplodoj dishakas la jam stumpigitajn arbotrunkojn kaj la domodratajn restaĵojn. La plej dikaj fosas grandajn kavaĵojn, kraterojn, kiuj transformas la ebenaĵon, detruas la tranĉeajn sistemojn, jen pillarĝigante la fosaĵojn kaj forigante la parapetojn, jen plenŝtopante ilin per movita teraĵo. Iuj krevigas la maldikan tegmenton de kavaj ŝirmejoj, kaj en ili mortigas la okupantojn, kiuj sin kredis tie en sekureco.

Iam mi uzis la vorton "infero" por karakterizi la vivon de la batalantoj tia, kia mi ĝin imagis. Kiun vorton apliki nun al la Verduna apokalipso? Pri ĝi ni scias konfuze laŭ gazetaj priskriboj kaj laŭ kelkaj konfidencoj de evakuitaj vunditoj - kvankam ili, kiel antaŭe, sin montras avaraj pri rakontoj, kaj ofte mutas.

* Ĝi estis daŭranta preskaŭ naŭ monatojn, ĝis la komenco de novembro.

La leteroj el la fronto venas pli malrapide kaj malregule ol iam ajn; ili estas ĝenerale tre koncizaj; nur kelkaj vortoj nerve skribaĉitaj per krajono sur ia paperpeco, iafoje ŝirita el kartoĉ-pakaĵo: "Mi fartas bone. Kisojn." Kiam oni legas tiujn avide atenditajn novaĵojn, jam pasis pluraj tagoj. Dume, kio okazis? La lasta de mia patro diris: "Jam 14 tagojn ĉe unua linio; ni atendis anstataŭontojn, ili ne venis: ni devas resti almenaŭ unu semajnon plu". La semajno pasis: ĉu fine ili povis ekĝui ripozon?

2. Militeto en lernejo.

8an de aprilo 1916.

La plimultaj el niaj instruistoj, mobilizitaj, estas anstataŭitaj de maljunaj, jam emeritaj kolegoj, kaj precipe de junaj fraŭlinoj freŝe diplomitaj de la instruistinaj altlernejoj. Tiuj ĉi, kun beletaj vizaĝoj, dolĉaj inaj voĉoj, milda kvankam intence severa rigardo, tre impresas al ni. Inter ni, ni nomas ilin per iliaj antaŭnomoj, krom unu blondineto, plej juna kaj delikata, kiun ni kromnomis la Pupo.

Inter la viroj restas nur unu ankoraŭ juna, kiu instruas francan lingvon kaj literaturon. Kun barbo kaj longaj haroj, li similas la romantikan poeton Alfred de Musset. Ni kromnomis lin, malpli poezie, la "Vila Simio", aŭ pli simple "la Vilulo". Sed nun pluraj lernantoj pretendas, ke li ne rajtas je tiu glora nomo, ĉar li estas "embuskanto". Mi ne samopinias. "Embuskantoj" estas mobilizitoj, kiuj ricevis favoran postenon, kaj li ne estas mobilizita: do pro iu motivo li estas trovita ne taŭga por la milita servo. Ni ja scias: la medicinaj kontrolkomisionoj ricevis tre striktajn instrukciojn; ili severe revizias ĉiujn virojn antaŭe sendevigitajn pro iu malsano aŭ kriplaĵo, kaj reakceptis multegajn el ili en la aktivan armeon. Certe ne sen valida motivo tiu juna viro estas lasita inter civiluloj.

Sendube li sentas, ke la lernantoj ne simpatie lin taksas. Li reagas per mallerta disciplin-metodo: li vere trouzas puntaskojn. Maltrafe: ni rebatas per brua malobeemo. Meze de la ĝenerala nervostreĉo, la lecionhoroj de la "Vilulo" estas aparte malkvietaj. Mi devas konfesi, ke mi estas unu el la plej bruemaj.

En tiu lernejo kiel en multaj aliaj konserviĝis la iom ridinda tradicio de pompa ceremonio: la ĉiumonata proklamo de la honortabelo. En kunveno la instruistoj starigas por ĉiu klaso vican liston de la plej meritaj lernantoj. La morgaŭon, la direktoro venas mem en ĉiun klasĉambron por laŭtlegi la liston.

Ĉi-matene estis neordinara ŝanĝo en la programo. Ĵus enirinte, la direktoro abrupte sin turnis al mi:

- "S-ro L., kial ĉi-monate vi ne estas en la honortabelo?"

- S-ro Direktoro, vi scias plibone ol mi. Sed mi vetus, ke nur unu instruisto kontraŭmetis sian vetoon.

- Ne estu tiel aroganta! Jes, nur S-ro M. postulis vian forstrekon. Certe ne sen motivo. Ĝis nun vi estis ĉiurilate bona lernanto, kaj viaj notoj en ĉiuj fakoj klasigas vin kiel unuan. Nun mi atentigas vin: via konduto nepre devos pliboniĝi.'

22an de aprilo 1916.

Mia konduto ne pliboniĝis - eĉ male, se eble. Mi tute malatentis la averton. Hodiaŭ la direktoro kunvokis min kaj alian obstinulon en sia skriboĉambro. Ĉeestis S-ro M., la "Vilulo".

La direktoro petis lin formuli siajn akuzojn kontraŭ nin. Je mia miro, li tion faris en modera tono, per sobraj vortoj, sed firme. En lia voĉo sentiĝis nenia malamo, sed neta deziro klarigi la aferon cele al restarigo de la fuŝita disciplino.

Mi provis diskuti:

"Kial S-ro M. estas la sola, kiu trafas maldisciplinemon? Ni riproĉas al li liajn tro aŭtoritatajn procedojn..."

Sed la severa direktoro ne inklinis al favora aŭskultado de tiaj rezonoj. Li ordonis silenton, kaj akre admonis nin. Li diris, kiel bonŝancaj ni estas, ĉar ni ricevas plenan instruadon en tiu ĉi tempo malfacila; kiel sendankaj ni estas kontraŭ la lerneja administracio, kontraŭ niaj sindonemaj instruistoj; kontraŭ la soldatoj, kiuj heroe defendas nin. Kaj li konkludis: "Ĉu vi ne hontas pro tia konduto, dum viaj patroj suferas en la tranĉeoj, kaj ĉiutage riskas sian vivon?"

Ĉe tiuj vortoj mia koro krevis, mi ne povis reteni larmojn. Veninte kun intenco miaflanke akuzi, mi nun troviĝis senvoĉa. Interne mi furiozis kontraŭ min. Ankaŭ la kamarado ploris, kaj restis muta.

Nun mi pripensas la vortojn de la maljuna direktoro. Certe li pravis: mia sinteno ne estas inda je filo de batalanto. Sendube, instruisto M. trouzas puntaskojn, sed tio estas lia propra kompreno pri edukado, kiun mi ne rajtas juĝi. Krome li estas bona pedagogo, kapabla, konscienca, sindonema. Mi nun konscias, ke iom post iom ni kreis al li malagrablegan, neelporteblan etoson. Sed kiel maldolĉe estas konfesi sian kulpon kaj sian penton!

Nu, mi cedis kaj promesis. Mi ĉesigos miajn bruajn manifestadojn. Mi rifuĝos en digna silento.

3. La "boŝoj".

Parolante pri germanoj, la viluloj, kiel ĉiuj francoj, diras "les boches". Sed en ilia buŝo tiu kromnomo ne ricevas fiigan akcenton. Nek malico nek malŝato: la batalantoj estimas siajn kontraŭulojn.

Mi aŭdis konversacion inter kelkaj viluloj.

La unua, el la Tesalonika armeo*:

" - Serboj kaj bulgarioj, kiaj batalantoj! Freneze bravegaj!

La dua, el la norda fronto:

" - Kaj la belgoj! Mi vidis ilin ĉe Izero. Kune kun angloj...

La tria:

" - Ha, la angloj!... Ankaŭ mi troviĝis apud ili. Kuraĝaj, certe, ofte eĉ malsingardemaj. Sed ili rigardas militon kiel sporton. Ili estas diletantoj, ili tro amas komforton, kaj volus transporti en la tranĉeojn la oportunaĵojn de la "sweet home"**. Ili sin razas ĉiutage, imagu!

Kvara:

" - Kion diri pri la italoj? Ankaŭ ili estas kuraĝaj, eĉ ardaĵ, impetaĵ - sed ne persistemaj. Fantaziuloj, kiuj pli sukcesas tenante mandolinon ol fusilon en la manoj... Pli solidaj, la rusoj; sed ili scias marŝi nur amase, grege; ili iras al morto kiel brutaro.

Kvina, el Verduno:

" - Entute, en la mondo estas nur du vere bonaj soldatoj: la franca kaj la germana. Kaj eĉ... la boŝoj, pli disciplinaj, bezonas esti ĉiam komandataj. Se forestas oficiroj, mankas ankaŭ iniciato. Ili estas kiel perditaj infanoj, kiel orfoj.

" - Efektive: ĉe ni, se eĉ mortis ĉiuj galonuloj, ĉiam el la sengradularo sin levas iu spontanea ĉefo."

Do, finfine, oni devas konkludi, ke nur la franca vilulo kapablas eltorniĝi en ĉiuj cirkonstancoj. Tiuj asertoj ŝajnas al mi malfacile pravigeblaj, kaj tiu ŝovinisma pretendo iomete stulta. Sed kiel mi povus argumenti kontraŭ spertuloj, kiuj tiom multekoste pagis la rajton havi personan opinion pri la temo?

Tamen, kiom pli mi ŝatas la vortojn de tiu najbaro, lignaĵisto, kiu venis hieraŭ por sestaga forpermeso:

" - La boŝoj? Kial mi malamus ilin? Al mi persone ili faris nenion malbonan. Kiel ni, ili suferas en la tranĉeoj kaj sopiras al paco. Kiel

* Vd. poste: IV, 3.

** angle: dolĉa hejmo.

ni, la plimultaj estas kampuloj aŭ laboristoj. Ili bedaŭras sian metion longe forlasitan, kaj al ili kiel al ni la milito neniom profitigas. Ili havas en sia lando edzinon kaj infanojn, kiuj malgaje atendas ilian revenon, timtremante pri ilia vivo. Ili estas same malfeliĉaj, same viktimoj kiel ni. Kiel ni, se ili povus, ili ĵetus for la batalilojn, kaj ĉiu reirus al sia hejmo, al sia familio, al siaj pacaj laboroj..."

"For la batalilojn"... Antaŭ la milito mi legis la belan romanon de Bertha von Suttner en la Esperanta traduko. Kiam efektiviĝos tiu bela sonĝo de l' homaro?

4. Patro evakuita.

23an de majo 1916.

Du semajnoj sen novaĵoj. Ĉiutage vana atendo. Ĉiunokte longa angoro.

Hodiaŭ, fine, kelkvorta letero: Patro estas evakuita. Li estis transportita al Yzeure apud Moulins, ĉe la rivero Allier, pli proksime de ni ol de la fronto. "Astenio kaj lumbago" - kion kaŝas tiuj vortoj? Ĉu pro tiaj motivoj oni estas forsendata tiel malproksimen? Maltrankvile, Patrino kaj mi tuj ekveturos.

24an.

Longa estis la nokto en la trajno.

Tuj post alveno ni kuris al la hospitalo.

Ni vidis Patron? Ĉu vere li? Apenaŭ rekonebla. Tiuj grandaj okuloj kun fiksa rigardo, tiuj kavaj vangoj kovritaj de griza barbo... Lia vesto fariĝis tro ampleksa, ĝi flirte pendas sur la korpo. Lia dorso, antaŭe tiel rekta, estas nun kurba. Li paŝas malrapide, ŝanceliĝe. Nur lia voĉo konservis netecon kaj ian viglecon, sed ĝi estas malpli laŭta.

Nun ni scias, kio okazis.

Lia tranĉeo estis bombardata de infanteria bomb-kanono. Li volis situigi ĝin por difini dispoziciojn cele al laŭeble efika ŝirmo al sia plotono. Por observi, de kie venas la pafoj, li suprenrampis sur la parapeton. Bombo falis proksime de li, la eksplod-blovo ĵetis lin alten, kaj li refalis en la fosaĵon; sen ia ŝirvundo, sed kun diversaj kontuzoj, kaj forte komociita. En lia flegbulteno ni legas: "astenio kaj lumbago sekve al komocio pro obus-eksplodo".

En tiu hospitalo estas kuracataj kaj flegataj diversaj neŭrozoj. Iuj estas preskaŭ frenezaj, aliaj havas en la membroj konstantan tremadon, aliaj ricevas momentajn memorperdojn; tiuj ŝi ŝtele eliras, oni retrovas ilin vagantaj sur la kamparo, plurajn kilometrojn fore, ne sciante, kie ili estas nek de kie ili venas, forgesinte pri sia identeco.

Mia patro estas el la plene klarmensaj, sed oni sentas, per io nedifinebla, ke li spertis drastegan perturbon. Li neniam estis tre babilema, nun li apenaŭ parolas. Li ŝajnas obsedata de nekomunikeblaj pensoj kaj bildoj. Ho Patro, kiu estis tiel vivoplena, rapidaga, bonhumora!

Ĉar la restado en hotelo estas tro multekosta, ni devas foriri, lasi lin tie - ĝis kiam?

30an de junio 1916.

Revenis mia 46-jara patro, relative resanigita, kaj, post fartokontrolo, definitive eksigita el la armeo.

Li reprenis siajn civilajn vestojn; ili bone sidas al li, ĉar li estas nun malpli magra. Li forzasis sian barbon kaj aspektas pli bonstata kaj pli juna. Li vivas, laboras, parolas normale.

Tamen, el apenaŭ percepteblaj signoj, ni sentas ofte, ke lia penso foriĝas. Tiam lia rigardo ŝajnas vidi, trans la ĉirkaŭantaj realaĵoj, iajn malgajegajn bildojn, kaj li longe silentas. Ne, li ne estas tute resaniĝinta. Ĉu eĉ iam li povos forgesi, kaj denove vivi feliĉe!*

5. For de la batalkampoj, vivo daŭre floras.

Florako, 12an de aŭgusto 1916.

En la hotelo de niaj gekuzoj, kiuj ĉiam rezervas lokon por ni. Tie ferias kelkaj personoj el Avinjona nobelaro, inter ili Johana de G., 14-jara. Ŝi skribas "Jehanne", laŭ la mezepoka ortografio. Tio ŝajnas al mi ridinda afekto aristokrata, sed pri la elekto de ŝia nomo kulpas evidente ne ŝi, sed nur ŝiaj gepatroj.

Ŝi estas bruna kun bluaj okuloj, grandaj, esprimoplenaj, kiuj nerezisteble altiras mian rigardon. Malgraŭ la malsama koloro de la okuloj, ŝi similas al mia arleza amatino, kun la du simetriaj harplektaĵoj, kiuj, pendante sur la brusto, enkadrigas ŝian belan vizaĝon.

* Longe poste, mia patro konfesis al mi, ke en tiu periodo li ofte estis tentata de sinmortigaj emoj.

Kune promenante en grupo da gejunuloj, ni ambaŭ apartiĝis kaj interparolis. Ŝia voĉo estas tiel rava kiel ŝia vido, kaj ŝia konversacio estas interesa. Stulta ŝi ja ne estas, mi trovas ŝin tiel inteligenta kiel bela.

Mi, kiu dum kvin jaroj evitadis la kompanion de knabinoj, nun serĉas la sian. Ĉu ŝi tion rimarkis? Ŝi afable min akceptas, kaj la petolemaj gejunuloj volonte, kvazaŭ komplice, lasas nin apartiĝi en niaj konversacioj, tro seriozaj laŭ ilia gusto. Ĉu vere estas precipe la temoj, kiuj interesas min? Kia sorĉo min kaptis?

13an de aŭgusto 1916.

Vespere, en la salono, mi estis sola kun mia kuzino Ivona, samaĝa kiel mi, kaj ŝia patrino. Ivona sidiĝis ĉe la piano, kaj ludis barkarolon. La lastaj notoj kristale sonis, kvazaŭ gutoj falantaj de remiloj sur la spegulan ebenon de lago.

Ŝi haltis momenton. Poste, sin akompanate, ŝi ekkantis melodion. Ĝi estis himno al amo; ne al la dia amo de la kristanoj, sed al la pagana dio Amoro. Kian senton metis en tiuj preskaŭ erotikaj vortoj la bela sopranvoĉo de tiu pura virgino!...

Fininte la kanton, ŝi leviĝis, venis al la kanapo, kaj sidiĝis apud mi, nenion dirante. Mi same silentis, daŭre sub la ĉarmo.

Apenaŭ konscie, mi metis mian brakon sur la dorsapogilon malantaŭ ŝi. Ŝi sidis kun rekta dorso. Se ŝi sin klinos malantaŭen, kaj apogos... kion mi faru? Sed ŝi ne moviĝis.

Poste kelkaj minutoj ni interŝanĝis kelkajn vortojn, kaj iris eksteren por rigardi la noktan ĉielon. En tiu regiono kun tre pura aero, je altitudo de 550 metroj, la stelplena ĉielo, brilegaj konstelacioj sur blunigra fono, estas mirinda spektaklo, pri kiu ni neniam laciĝas.

Sereno. Paco. Kiel malproksime estas la milito!

Nun mi sidas sur mia lito. Dormo longe ne venos. En la nokta silento sonoris dek du batoj la horloĝo de la kontraŭe staranta protestanta templo. Mi sidas, kaj meditas. Kio okazis al mi? Ĉu mi enamiĝis al la juna Johana el Avinjono? Ĉu al mia 16-jara kuzino Ivona?

Ho Margareta, ĉu mi fariĝis malfidela?...

21an de aŭgusto 1916.

Morgaŭ forveturos Johana. Kun ŝi kaj kun Ivona solaj, mi

ekskursis sur la altebeno, super milmetra altitudo. Tie ofte regas vento, sed hodiaŭ ne sentiĝis eĉ plej eta blovo. Neniu nubo en la ĉielo, la suno blindige ardis. Sur la seka ŝtonplena tero stridis diversaj insektoj, kaj sur la malmultaj arboj kelkaj cikadoj - maloftaĵo: nur en varmegaj someroj cikadoj venas de la mediteranea sudo ĝis tie ĉi.

Por miaj du kunulinoj mi kolektis bukedojn da lavendfloroj. Jam duonvelkintaj, grizetaj kaj sekaj, ili konservis tutan sian aromon dolĉe pikan. La du knabinoj flaris ĝin kun videbla plezuro.

Ni iris, paŭzis, remarsis; ne urĝis nia reveno. Ni longe malfruiĝis; jam la krepusko ombris la valon, kiam ni kure malsupreniris al la urbeto. Ni estis gajaj, kontentaj. Pri estonteco kaj pri ĉio ekstera mi ne volis pensi.

6. Revoj de batalantoj.

28an de aŭgusto 1916.

La nova reĝo Karolo de Rumanio proklamis militon al Aŭstrio-Hungario, kaj samtempe Italio, fine, al Germanio. Laŭ iuj komentantoj, tio estas signo, ke la alianco de la centraj imperioj jam troviĝas en kriza situacio, kaj tiu aliĝo de novaj freŝaj fortoj akcelos la progresadon de nia fina venko. Mi dubas...

30an de aŭgusto 1916.

Dum daŭras la Verdun-batalo, en la lasta monato angloj kaj francoj provis grandan ofensivon ĉe la rivero Sommo. Ĝis nun sen plia sukceso, sed ne malpli multekoste. Nova batalego, nova infero, nova hekatombo.

Tie estis vundita mia onklo Amedeo, la plej juna frato de mia patrino. Li estas evakuita, kaj flegata en Limoĝo. Patrino iris tien, kaj vidis lin. Li ricevis obus-spliton en la dekstran brakon. La vundo infektiĝis, kaj dum du semajnoj estis dubo, ĉu li konservos sian brakon. Nun, feliĉe, la danĝero estas forigita, la membro savita, kaj la kirurgo asertas, ke ĝi reakiros sian plenan uzeblon. Pro tio Amedeo ĝojas tiom pli, ke li estas manlaboristo. Li ĝojas ankaŭ pro tio, ke la komplikaĵo prokrastas la cikatriganon, kaj necesigos pli longan restadon en la flegejo. Pri la konsekvenca sufero li ne atentis: "Tie ĉi, li diras, estas pli komforte ol ĉe Sommo."

14an de septembro.

Amiko ricevis resaniĝan forpermeson. Ne sekve de vundo. Li ra-

kontas:

- "Mi estis evakuita pro skabio. Mi do povis marŝi senhelpe. Mi trankvile iris malantaŭen, kun mia evakua legitimilo en poŝo.

"En komunika tranĉeo mi renkontis alian vilulon, kiu iris kontraŭdirekte, al la unua linio. Li demandis: "Kio okazis al vi?"

"Mi, kun larĝa rideto:

- Min trafis skabio.

"Li, kun envia rigardo:

- Bonŝanculo!... Tio estas kontaĝa, ĉu ne?

- Ja certe.

"Li tuj suprenfaldis sian manikon sur la dekstra antaŭbrako, kaj rapide diris, tute ekscitite:

- Frotu tie, amiko, frotu forte!"

7. Malamikoj interfratumas. Parencoj interdisputas.

19an de septembro 1916.

Onklo Leono, bofrato de mia patrino, 42-jara, estas mitralisto. Li venas de "trankvila sektoro", kaj rakontas:

"Inter la unuaj linioj, tie ne tre proksimaj, troviĝas fonto. Tien ni iras por ĉerpi akvon, kaj kelkafoje ni renkontis germanajn soldatojn samcele venantajn. Post momenta malfido kaj hezito, ni interŝanĝis kelkajn vortojn. Ili apartenis al bavara regimento; la plimultaj estis kamparanoj.

"Iom post iom la renkontoj fariĝis pli oftaj kaj pli senĝenaj. Ni rendezuis por iri al la fonto ĉiutage en la sama horo. Ni parolis pri niaj respektivaj familioj, montris fotojn, interŝanĝis tabakon, manĝaĵojn, diversajn objektojn kiel memoraĵojn.

"La komandantoj el la du flankoj baldaŭ estis informitaj pri tiu fratumado. Ili ne ŝatis tion, sed fermis la okulojn.

"Iun tagon, la kontraŭaj najbaroj avertis nin: Atentu: morgaŭ venos anstataŭi nin prusa regimento el pli junaj soldatoj. Gardu vin: eble tiuj estas disciplinitaj kaj fanatike patriotaj.

"De tiu tago ni evitas interrenkontojn. Ni daŭre vizitadas la fonton, ili kiel ni; sed per silenta interkonsento ili kaj ni iras tien en alternaj horoj. Ni vidas ilin, kaj ili vidas nin, sed neniam iu pafis al akvoĉerpantoj, de kiu ajn flanko. Eble iam ni provos renovigi kun tiuj prusoj la amikajn rilatojn, kiujn ni havis kun la bavaroj."

Iuj homoj stulte ridas, kiam oni rakontas pri germanaj soldatoj, kiuj venis al niaj sen armiloj, kun levitaj brakoj, kriante: "Kamerad!". Tamen, ĉu tiu voko ne respondas al profunda vero?

Tiuj viroj, kiuj nur pro obeo al ordono, pafas unuj al aliaj, fakte estas funde samaj kaj suferas saman sorton. Ĉu ili ne devus rigardi sin reciproke kiel kamaradojn?

10an de oktobro 1916.

Tagmeze, ĉe miaj geavoj, ni manĝis kun mia 40-jara onklo Ĵakvo, veninta el tranĉeoj, kaj 30-jara kuzino Aŭgustena, kies edzo estas ĉe la fronto, kaj kiu laboras en fabriko de municioj. Mi provas reverki la konversacion, dum ĝi estas ankoraŭ freŝa en mia memoro.

Ĵakvo - Nu do, Aŭgustena, vi tomas obusojn?

Aŭgustena, preskaŭ fiere -- Jes.

Ĵ. - Obusojn, kiuj eble mortigos francojn? Ĉar ne tre malofte, ĉu pro mallerta pafado de niaj artilerianoj, ĉu pro difekto en la municioj, francaj obusoj trafas francajn trupojn...

A. - Ho! tamen, tamen...

Ĵ. - Cetere, francojn aŭ germanojn... obusoj estas destinitaj por mortigi homojn. Ĉu, via opinio, fabrikado de mortigiloj estas normala okupiĝo de virinoj?

A. - Ĉu virinoj, ĉu viroj, iu ilin fabrikos. Se ne ni, laboristoj embuske mobilizitaj en la uzinoj. Ĉu tion vi preferus?

Ĵ. - Jes, tute certe. La rolo de virino...

A. - Mi scias: krei vivon, ne detruai ĝin. Naski homidojn, kaj varti ilin, por ke poste vi mortigu ilin...

Ĵ. - Ni viroj estas frenezaj. Almenaŭ lasu al ni la plenan respondecon pri nia frenezo. Se vi imitas nin...

A. - Kies kulpo? Kion ni faru? Vi viroj havas la forton kaj la armilojn. Vi, ne ni, elektis reprezentantojn kaj registojn.* Kiam ili decidis sendi vin al buĉado, anstataŭ ribeli kaj turni viajn fusilojn al la mastroj kaj komandantoj, vi obeis, vi marŝis. Kaj vi daŭrigas. Dume, ni ricevas ĉiutage po unu franko kaj dudek kvin centimoj. Ĉu per tio ni povas vivteni nin? Ĉu per same malgrasa monhelpo ni povas nutri, vesti kaj eduki viajn infanojn? Nun alia laboro ne estas trovebla. Ĉu ni prostituigu?

Ĵ. - Ho! kiom da edzinoj de batalantoj kaj de militkaptitoj jam kondukas kiel putinoj!

A. - Kies kulpo, ankoraŭfoje? Ĉu ne vi unuaj forlasis kaj perfidis viajn edzinojn aŭ fianĉinojn, por iri al tiu fia malĉastulino, al tiu plej

* En Francio la virinoj ricevis la voĉdonrajton nur en 1945.

granda putinaĉo, la milito?...*

Avino. - Nu, mi petas, ĉesu disputi. Fakte vi ambaŭ, kiel ni ĉiuj, same pensas pri la fundo de la demando. Nĝ povas interkonsente diri, ke la milito estas la plej abomena plago, kies viktimoj estas ĉiuj familioj. Krome, ne nur fabrikante armilojn aŭ municiojn oni helpas al milito. Kiuj kudras aŭ teksas, aŭ transportas, ĉiuj laboristoj, eĉ panistoj kaj terkulturistoj... Ni ĉiuj estas ne nur viktimoj, sed ankaŭ, vole-nevole, komplicoj. Sed kion fari?

Ĵakvo - Pacienĉu, Patrino. La viluloj estas lacaj. Iam ili ekribelos; Tiam, mi esperas, ke la civiluloj, krom la militaristoj kaj la profitantoj, unuanime helpos nin.

Avo - Ĝis tiam, estu singardemaj. Ne rediru ekstere tion, kion ni aŭdis inter ni. Kiel diras la oficiala propagando: "Silentu! Gardu vin! Malamikaj oreloj vin aŭskultas." Ne malpli danĝeraj ol la aliaj, la internaj malamikoj (ŝovinistoj, "ĝisfinistoj") estas ankoraŭ potencaj...

7an de decembro.

Mia antaŭvido, fine de aŭgusto, estis ĝusta. Komence la rumana armeo senpripense atakis, kaj invadis Hungarion. Sed baldaŭ la aŭstroj-germanoj, venkinte la rusojn sur Karpatoj, regroupigis siajn trupojn kaj turnis ilin kontraŭ la novan orientan malamikon. Sub la premeĝo de tre supera forto, la rumanoj siavice devis orde retiriĝi, perdis multajn mortintojn kaj kaptitojn, kaj hieraŭ Bukareŝto falis.

La bloko de la centraj imperioj ne multon perdis el sia militista fortego. Eble ĝi estas fine pereonta, sed nun mi komparas ĝin al apro sieĝata de ĉashundaro. Ĝia nazego estas ankoraŭ tre fortika, kaj ĝiaj defendodontoj ege danĝeraj.

La paco estas ankoraŭ malproksima...

* En franca lingvo la substantivo "milito" estas ingenra.

IV. 1917

1. Longa tunelo.

20an de februaro 1917.

Hieraŭ estis la deksepa datreveno de mia naskiĝo. Mi reprenas tiun ĉi kajeron post preskaŭ dumonata interrompo. Mi eliras el longa tunelo.

Kelkajn tagojn antaŭ Kristnasko, sentante min febra, mi iris al la familia kuracisto. Li metis termometron sub mian akselon. 39,6° C! "Rapidu hejmen, li diris; Tuj enlitiĝu. nenion manĝu, trinku multe, kaj atendu min morgaŭ matene."

Mi jam komprenis. De antaŭ pluraj monatoj regadis en la urbo epidemio de tifoida febro. Mortis relative multaj personoj, inter ili unu el miaj samklasanoj.*

La malsano tenis min tri semajnojn, dum kiuj mi kuŝis kun glacio sur la ventro, kaj nutris min nur per lakto. Patro instalas en mia ĉambro bankuvon, kiun li ĉiutage plenigis per varmota akvo, 37° C. Mi trovis ĝin preskaŭ malvarma. Por mergi min en la banon, mi nepre volis leviĝi sen helpo kaj marŝi kelkajn paŝojn al la kuvo, ŝanceliĝe sur miaj kruroj, tra kies haŭto reliefis la ostoj. Mi rigardis mian vizaĝon en mura spegulo: kavaj vangoj, elstaraj vangostoj, larĝaj fiksaj okuloj, maldensa senbrila hararo.

Mi malpermesis, ke iu ajn envenu en la ĉambron, krom nur miaj gepatroj kaj la kuracisto, kvankam tiu ĉi asertis, ke la malsano estas epidemia, sed ne vere kontaĝa.

Post kelktaga interrompo, la febro revenis. Mi refalis en malsanon por dua periodo de tri semajnoj. Patrino pasigis la tutan tempon en mia ĉambro, apud mia lito, apenaŭ iafoje duondormante en fotelo. Patro, krom sia ĉiutaga laboro, prizorgis hejme la mastrumadon, proviantojn, kuiradon por ili ambaŭ. Mi kredas, ke tiu sindeviga okupiĝo, tiu senĉesa aktiveco, deturante lin de liaj funebraj pensoj,

* Ĝis eltrovo de antibiotikoj, tiu malsano estis ja tre danĝera.

pensoj, forte helpis al lia resaniĝo.

Tage kaj nokte bruladis verdakverka ligno en la kameno de mia ĉambro. Malgraŭ tiu konstanta hejtado, la temperaturo malofte superis 8° C, ĉar tiu vintro 1916-17 estis treege malvarma. Mi pensis pri la malfeliĉaj viluloj en la tranĉeoj.

Sed ofte mi pensis pri nenio. Mia cerbo ŝajnis malplena kaj rigida. Mi floris en nepreciza stato inter dormo kaj vekiteco.

Iam, ĉu nokte, ĉu tage? mi vidis en sonĝo belegan ĝardenon kun mirindaj arboj, razenoj kaj floroj. En ĝi mi renkontis mian mortintan kamaradon. Li venis al mi kun afabla rideto, premis mian manon, kaj diris: "Ni, vi vidas: estas agrable tie ĉi." Vekiĝinte kiel en nebulo, mi rememoris tiun brilan sonĝon, sed ne rakontis ĝin.

Subite ĉesis la febro. Mia interna temperaturo abrupte falis de 41 ĝis 35,5° C. Mi estis treege malforta. Oni injektis al mi kamforoleon.

Nun mi denove povas manĝi, kaj mi sentas grandan malsaton. Mi scias, ke mi devas singarde moderigi mian apetiton: la parieto de miaj intestoj ege maldikiĝis, kaj mi riskus danĝeregan peritoneiton.

La vetero estas bela, jam pli milda. Tra la malfermita fenestro mi aŭdas gajajn birdokantojn. Mi leviĝas ĉiutage mallongan tempon, faras kelkajn paŝojn, sidiĝas apud la fenestro. Tie mi restas senpense, ĝuante vegetan ripozon.

12an de marto 1917.

Mi sentas mian fizikan forton iom post iom reformiĝi, sed mia cerbo restas nebula. Mi provis malfermi kursolibrojn: mi nenion komprenas. Ŝajne mi forĝesis ĉiom, kio mi antaŭe lernis. Nur beletraĵojn mi povas legi, ne tro longe, ĉar mia atento rapide laciĝas.

16an de marto 1917.

Mi tralegas gazetojn. Hieraŭ la caro abdikis; revolucio en Petrogrado kaj Moskvo.

Dume, ĉe ĉiuj frontoj plu daŭras la milito.

2. Ŝtorma printempo.

6an de aprilo 1917.

Hieraŭ Usono eniris en la militon.

Ĉu la tuta mondo freneziĝos?

.....

Krom la fiaska ofensivo ĉe Sommo, kiu estis nur flankatako por detumi la germanojn de ilia premeĝo al Verduno, generalisimo Joffre kutime pli inklinita al daŭrigo de la pozicia milito. Li diris: "Mi rodetas ilin". La regantaj politikistoj trovis tiun sintenon tro pasiva; ili preferis iun pli mordeman. En decembro 1916 ili eksigis Joffre kaj elektis generalon Nivelle.

En marto 1917, por mallongigi sian fronton, la germanoj retiris trupojn sur la tre fortikigitan Hindenburg-linion. La nova franca generalisimo opiniis la cirkonstancon favora por granda frapo. En aprilo li ordonis larĝan atakon sen artileria preparo, por krei surprizon ĉe la atakatoj. La ruzo estis fruktodona. Komence angloj kaj francoj sukcesis okupi poziciojn ĉe Craonne kaj Chemin des Dames, kaj progresis je pluraj kilometroj. En Francio naskiĝis granda espero. Iuj ĵurnalistoj jam anoncis trarompon de la fronto.

Baldaŭ venis elreviĝo. La germanoj, ankoraŭ tre fortaj, vigle reagis. Iliaj kontraŭ-atakoj haltigis la progresadon. La fronto ree stabiligis sur la novaj pozicioj. La tuta afero, jam finita, sin saldis per gravegaj perdoj.

Ĉe la viluloj ekflamis granda kolero. Tra la tuta lando disvastiĝis konfuza murmuro. De buŝo al orelo cirkulis nekontrolitaj informoj; rakontoj pri oficiroj pafmortigitaj de siaj soldatoj, pri kadavroj de ĝendarmoj pendigitaj per la kolo ĉe hokegoj en butikoj de viandviandistoj, pri opaj rifuzoj de obeo al batal-ordonoj; famo pri pluraj regimentoj, kiuj ribelis kaj volis marŝi al Parizo.

Nivelle estis limoĝita*. Anstataŭ li, al la supera estreco estis vokita Pétain, fama pro sia energio. Pétain, la "savinto", la "venkinto de Verduno" (kvazaŭ, venkinte aŭ ne, la merito ne estus tiu de la viluloj mem, kaj nur de ili!). Oni diris, ke por restarigi la disciplinon Pétain ordonis opajn ekzekutojn, kaj multaj soldatoj estis fusilitaj**.

Sendube pluraj el tiuj rakontoj estas nuraj elpensajoj, sed kelkaj estas verŝajnaj. En la lando agitas la "ĝisfinistoj"***, la ĝisoste batal-

* Iu generalo pro nekapableco estis senigita je sia komando ĉe la fronto, kaj sendita kiel militista regionestro en Limoĝon. De tie la milit-slanga neologismo "limoĝi", kiu plu vivis, kaj estas ankoraŭ nun uzata en pli larĝaj aplikoj: pri ministroj, parti-ĉefoj ks.

** Ankoraŭ nun oni diskutas pri la ekzakta nombro da "fusilitoj por ekzemplo". Tiu nombro estas verŝajne multe pli malgranda ol oni tiam kredis. Sed, eĉ se nur unu, ĉu ne estus tro?

*** Oni nomis "ĝisfinistoj" tiujn, kiuj volis daŭrigi la militon "ĝis la fino", t.e. ĝis fina kaj kompleta venko.

emaj (prefere pere de aliaj). La reakciaj partioj, kiuj ĉiam denunciadis "spionojn", "perfidulojn", "defetistojn", kaptis la okazon por akuzi maldekstrajn gvidantojn. Sistema persekutado organiziĝis, kaj komenciĝis pluraj sensaciaj procesoj.

Forpasis la iluziaj esperoj: unue pri venko sur la batalkampoj, poste pri liberiga ribelo de la batalantoj kaj de la popolo. La mondo refalas en rezignacion, kaj enprofundiĝas en la abismon.

3. Dolĉa printempo.

.....

Iom post iom mi sentas en mia korpo refortiĝon kaj revigliĝon. En ĉi tiu lernoĵaro, en kiu mi devis prepari min al konkurso por akceptiĝo en "Artoj kaj Metioj", mi sekvis la kursojn nur dum la tri unuaj monatoj, kaj mi estus ankoraŭ nekapabla je serioza lernolaboro. Neniam mi povus kompensi la perditan tempon. Mi devas rezigni, almenaŭ por ĉi-jaro: ĝi estas por mi senespere neniiĝita.

En dimanĉoj mi retrovas kvar el miaj klaskunuloj, kiuj nun daŭrigas sen mi: Marcelo, Renato, Amato, Luizo; plus Roĝero, iom pli aĝa, kiu sin destinas al instruisteco. Ni kune piediras sur la kamparo plena je floroj, belega en tiu ĉi sezono. Nia sesopo estas unuigita en vera amikeco. Marŝante aŭ sidante, ni interparolas kaj diskutas pri plej diversaj temoj, tre malofte pri milito. Meze de la bela naturo, tiel serena, ni sentas nin tre malproksimaj de la ĉirkaŭa plago.

En semajnotagoj, vespere post la kursoj, ni ofte vizitas nian amikon Johano. Fine de decembro li malsaniĝis samtempe kiel mi, post lasta ekskurso, kiun ni du faris solaj al mezepoka kastelo. Dum mi infektiĝis per tifoido, lin trafis pulm-inflamo, kaj de tiam li ne resaniĝis. Li nun restadas en kampardomo, flegate de sia patrino.

Johano estas delikata poeto. Malgraŭ lia malbona sanstato, liaj poemoj ne estas malgajaj elegioj; ili esprimas ardan vivemon kaj ĝojon. Hodiaŭ li komencis laŭtleĝi al ni madrigalon, kiun li dediĉis al juna najbarino:

"Venu, venu al mi en sincero kaj fido.

Mi legos el la brilo de viaj okuloj,

De l' spirito kaj kor' la fidelaj speguloj,

Kaj divenos, ĉu via petolema rido

Estas intenca mok' aŭ nura ĝoj-avido..."

Kelkajn versojn plu, kaj li abrupte interrompiĝis, skuante de ektusego. Li premis al sia buŝo puran blankan naztukon; ĝi koloriĝis per ruĝa makulo. Konsternite ni ŝtele interrigardis nin:

hemoptizo, jam!*... Sed li reparolis tute nature, ŝajnigante plenan senzorgecon. Li simple petis min daŭrigi la laŭtlegadon..

En belveteraj posttagmezoj mi sola promenas ekster la urbo. Ofte mi vizitas la iaman kastelon de Abato de Sauvage, okcitana poeto: bela konstruaĵo, kiu servas nun kiel farmo. Ĉirkaŭ ĝi staras grandaj, tre belaj arboj: piceoj, cedroj, pinastroj, cembroj, ileks-kverkoj, korkokverkoj kaj aliaj, plantitaj en la 18a jarcento de la abato-poeto. Tiu klera kleriko estis naturamiko kaj botanikisto, verŝajne pli ol pastro.

Nia grupeto havas agrablajn rilatojn kun la farmisto kaj lia afabla edzino. Tiuj gekampuloj, neniel krudaj, havas 16-jaran filinon. La dolĉa Margareta estas blonda kaj bela. Mi ne amas ŝin kiel la alian Margaretan, sed inter ŝi kaj mi naskiĝis amikeco sen mikso de koketumo aŭ io ajn dubsenca. Mi tre ŝatas ŝian kompanion, kaj ŝi volonte konversacias kun mi. Ŝi estas inteligenta, sprita kaj ne senkultura.

Kiam mi ne interparolas kun Margareta, mi amas grimpi sur altan cedron, kies horizontalaj branĉoj formas oportunan ŝtuparon. Sidante sur unu el la plej altaj, mi lasas min balanci de la siblanta vento, en la knaretoj de la skuata branĉaro, kaj restas tie longe en konfuza revado.

Aliafoje mi sidiĝas sub grandega tilio, en la ombro de la foliaro kaj la parfumo de la floroj, kiujn rikolte vizitas zumantaj abeloj. Mi tiras libron el mia poŝo kaj legas kelkajn paĝojn.

En la unua kvarono de tiu ĉi lernoĵaro, mi retroviĝis en la kurso pri franca lingvo kaj literaturo kun instruisto M., la "vilulo" - sed nun en tute alia rilato. Ni estas 17-jaraj, li traktas nin kiel plenkreskulojn: ne punas nek minacas, ne sidas solene en katedro sur podio, sed familiare inter ni sur benko. Kaj ni kun miro malkovris ne nur eminentan pedagogon, sed brilan parolanton, kiu prezentas la francan literaturon sub lumo por ni tute nova. Li ŝatigis al mi la poetojn kaj prozistojn de la Mezepoko kaj de la Renesanco. Nun mi ĝue legas iliajn verkojn en tiuj arkaikaj formoj, gustoriĉaj, de la franca lingvo de la 14a, 15a kaj 16a jarcentoj. Hodiaŭ mi tute relegis, jam trian fojon, la mallongan verkon de La Boétie, "**Memvola Servuto**"**. En tiu teksto sin esprimas, tra la singard-

* Ĝis la eltrovo de penicilino kaj streptomicino, ftizo estis danĝera malsano, precipe ĉe gejunuloj. Johano mortis 20-jara en 1920.

** Ĝi aperis en E-traduko de K-do ROL ĉe SAT-broŝurservo.

emaj formoj, kiuj estis neeviteble necesaj en tiu epoko, unu el la plej liberpensaj spiritoj el ĉiuj tempoj.

Tiel pasas ravaj horoj, for de la nuntempaj malgajegaĵoj.

Malproksimaj estas ankaŭ la zorgoj pri mia estonteco. Mi ne scias, ĉu venontjare mi povos remeti min al fruktodona studado de matematiko kaj fiziko, kaj efike prepari min por la konkurso, kiun mi devis unuafoje preterlasi. Pri tio mi apenaŭ pensetas. Mi penas forgesi ĉion eksteran al la nuna momento, vivi nur en ĝi, kaj plene ĝui ĝin: "Pluku la tagon"*.

4. Milda lumo estingiĝis.

10an de majo 1917.

Dum mi vivis egoiste, ĝuante mian personan feliĉon kaj forigante mian penson de la ĉirkaŭaj suferoj kaj turmentoj, la milito iris sian vojon senkompate, kun sia akompano el malfeliĉoj, kaj la morto ĉiutage falĉis.

Ne nur inter la batalantoj.

Hodiaŭ venis al ni konsterna novaĵo: en Varsovio, la 14an de aprilo, mortis D-ro Zamenhof. Verŝajne prokormalsano.

"Ho mia kor'..."

Tiu tro sentema koro "trankviliĝis de l' batado". Ĝi ĉesis bati nun, kiam la "venko en decida hor'" ŝajnas pli iam ajn malproksima, eble por eterne forigita. La paca batalanto, venkite, kapitulacis.

La esperantistaro funebras pri sia amata Majstro, kaj pri lia frakasita idealo. Ho! kiel amaraj estis certe la lastaj tagoj, la lastaj monatoj, la tri lastaj jaroj de la milda homarano!

Ĉu do "ne plaĉis al la sorto lia penso kaj laboro"? Ĉu ĉio estis vana?

Ĉu venis al li la morto "en espero, sen doloro?" Ĉu ne, pli kredeble, en malespero, kun doloro?

Kiom da "ĉu" leviĝas en mia malgaja penso!

Ĉu la diligenta kolegaro sufiĉe gardos la memoron pri tiu, kiu volis esti nur iniciatinto, sed kiun lia eksternorma personeco faris, vole-nevole, morala gvidanto? Ĉu ĝi scios venĝi lin, en la sola maniero, kiun li akceptus: nome per pli vasta florigado de homaramo? Ĉu la postmilitaj esperantistoj reprenos la vokon de Gabriel Chavet en la solena malferma-kaj-ferma kunsido de la Deko

* "*Carpe diem*" (Horacio, Odoj I, 11, 8)

Deka* en Parizo:

"Vivu ĉiam, malgraŭ ĉio, la interna ideo de Esperanto!"

Mi ĵuras al mi, kaj mi estas certa, ke multaj en la mondo same ĵuras: se mi postvivos tiun ĉi teruran epokon, mi ĉiam restos fidela al la memoro de Zamenhof kaj al lia heredaĵo.

Falis la Majstro. Kresku la afero!

Mortis D-ro Esperanto. Vivu Esperanto!

5. Tutmonda brulego.

.....

En lastjara printempo angloj kaj francoj elŝipigis trupojn en Tesaloniko, kie loka revolucio proklamis respublikon. Tie regroupiĝis la restoj de la fiaska kampanjo ĉe Dardaneloj; per sinsekvaj plifortigoj precipe el Francio (koste de gravaj ŝippereoj pro germanaj torpedoj) organiziĝis granda armeo por ataki Bulgarijon de sude.

La 1-an de decembro 1916 en Ateno, partianoj de la german-amika reĝo Konstanteno masakris francajn maristojn. Francio kaj Britio decidis blokadon al Grekio. En junio 1917 Konstanteno devis abdikii, kaj ĉefministro Venizelos trudis al la juna reĝo Aleksandro militproklamon al la Centraj Regno.

Nun tuta Balkanio denove estas militanta. Krom Hispanio, Svisio, Nederlando kaj Skandinavio, tuta Eŭropo estas enmiksita en la konflikto. Portugalio sendis ekspedician korpuson kontraŭ Germanio ĉe la francan fronton. Tie batalas ankaŭ soldatoj el Kanado, el Hindio, el Aŭstralio kaj Nov-Zelando, nun el Usono, kaj el ĉiuj afrikaj kaj aziaj kolonioj. Eĉ Japanio, jam en aŭgusto 1914, ekmilitis kontraŭ Germanio. La fajro etendiĝis al ĉiuj mondopartoj.

6. El fora praepoko.

25an de junio 1917.

Hieraŭ estis belvetera dimanĉo. Nia amika grupeto transpasis Gardonon sur la Malnova Ponto, iris sur la vojo al Anduzo kaj Montpeliero, akso de la Kvartalo de l'Suno, turniĝis sur Napoleonstrato kaj eliris el la urbo. Ĉe la piedo de San-German-monteto, vojeto premita al la ebenvalo de Alzono, ĉe kies bordo staras inter altegaj platanoj la renesanca kastelo de Areno. Ni pasis apud granda farmodomo, kies afablajn gemastrojn ni konas, sed ne haltis tie. Ni malsupreniris al la rivereto, ombrata de jarcentaj ileks-

* La Deko Universala Kongreso, 2an de aŭgusto 1914.

kverkoj, transpasis ĝin sur submergebla ponteto, daŭrigis la iradon sur ŝtonplena vojeto tra makiso el malgrandaj verdaj kverkoj, juniperoj kaj kadoj*. Fine, post ses-kilometra marŝado, ni atingis la vilaĝeton Valz, kies belaj domoj el hakformitaj kalkoŝtonoj elegante staras sur la deklivo de montetflanko.

Tie ni haltis. Per simplaj, de ni mem faritaj instrumentoj, ni komencis topografiajn mezurojn inter la vilaĝo kaj la rivereto, kiu fluas, kelkajn metrojn malsupre, je horizontala distanco de 2,5 kilometroj. Nia celo: desegni geologian sekcon tra la diversaj tie kuŝantaj roktavoloj. Marŝante ni kolektis amonitojn kaj aliajn fosiliojn, zorge atentante, ke ĉiu el ili troviĝu sur sia propra loko, kaj ne estu tien portita de homa mano, ŝovita de piedo aŭ trenita de surface fluanta pluvakvo: ĉar per la determino de iliaj respektivaj specioj ni povos precize difini la aĝon de ĉiu tavolo.

En la fluejo mem de la rivereto la fundo kaj la flankoj konsistas el griza lamena marmo: tre konfuzitaj tavoloj, jen horizontalaj, jen oblikvaj aŭ vertikalaj, el kiuj unu, pli kompakta, estas aparte fosilihava. Ni paŝis tie kun la piedoj en la akvo mem. Subite Amato ekkriis: "Fiŝo!". Ni ĉiuj proksimiĝis. Efektive, sur glata marnoplato vidiĝis neta premspuro de fosilia fiŝo. La unua, de kiam ni komencis esplori tiun valeton, iam al ni konigitan de ia patro. Tre ekscititaj de tiu eltrovo, ni deklaris, ke ni devos reveni, diligente serĉi kaj nepre trovi aliajn**. Por tiu tago, sufiĉe: estis tempo reveni al la urbo.

Ni do envojiĝis, babilante pri tiuj atestoj de enmara vivo, ducent milionojn da jaroj antaŭ la apero sur la tero de la unuaj homoj.

Kiam ni alvenis denove ĉe la bordo de Alzono, Roĝero diris: "Jen estas la marŝokanto, kiun vi petis de mi por nia bando." Kaj li komencis kanti per sia bela tenorvoĉo, vibranta de juna aro kaj fervoro. Ni aŭskultis kun miro. Marŝo ja, kun vigla takto, kaj kune

* kado: oksicedra junipero (*Juniperus oxycedrus* Linné), el kies frukto oni ekstraktas kadoleon.

** Poste, en la daŭro de jaroj, Marcelo kaj mi elfosis tie restaĵojn de reptilioj, krustacoj kaj aliaj marbestoj, inter ili multaj fiŝoj el kvar specioj, kiujn pristudis kaj determinis la fama profesoro Arambourg. Unu, eltrovita de Marcelo en 1934, estas difinita de tiu scienculo kiel tipo de "nova specio". Tiu specimeno, ĝis nun unika en la mondo, estas konservata en la Naturhistoria Muzeo de Parizo, kaj gipsa muldaĵo en tiu de Nimo.

himno al naturo kaj juneco, kaj al la gloro de niaj amataj Cevenoj. Li mem verkis la parolojn kaj komponis la muzikon. La ario kaj la vortoj estas tiel facile memoreblaj, ke ni tuj rekantis fiore. Kaj Renato, kies voĉregistro estas iom pli malalta, improvize aranĝis basparton.

Ni varme gratulis Roĝeron. Li tuj improvizis duan strofon, kaj mi trian. Ho! certe, tio ne estas poezia majstroverko, inda esti konservota en la memoro de la posteularo; sed ĝi plene konvenas al nia senpretenda areto da junaj amikoj, kaj ni entuziasme ĝin adoptis kiel distingnan kanton.

Ni revenis ĝojplenaj, lumigitaj de la ruĝaj oblikvaj radioj de la subiĝanta suno. Kiel for de la nunaj frenezaĵoj de *Homo sapiens!**

7. Mi havis kamaradon...

.....

Ne temas pri la fama kanto de la germanaj soldatoj**. Ni ne estis du apudmarŝantaj batalantoj: nur li estis militisto, kvankam apenaŭ pli aĝa ol mi. Li venis de Maroko kiel 17-jara volontulo por militi en Francio.

Mi renkontis lin en Arlezo, kie li, evakuite de la fronto, restis en centro por flegataj vunditoj.

Li loĝis tie en vasta tendego, ĉe kies eniro pendis surskribo: "Sekcio de la nekuraĉeblaj". Kial do? Li aspektis tute bonfarta. Li estis altstatura, larĝaŝultra, forta, vigla, gaja. Li estis...

Ni interparolis, kaj baldaŭ amikiĝis. Lia nomo estis Ali ben Abdallah.

Veninte kun mi ĉe miajn geavojn, ofte li ree vizitis la domon. Li amis longe paroli kun mia avo, kiu ankaŭ trovis plezuron en tiuj konversacioj. Sed, se avo kaj mi forestis, kaj restis virinoj solaj - mia avino kaj mia juna kuzino Henrieta - Ali respektive salutis ilin, kaj rifuzis eniri: tion malpermesis lia religio kaj lialanda moro.

Iun tagon ni kune sidis, trinkante verdan teon kun mento, en araba kafejo de la Raket-kvartalo***. La ĉambro estis plena de marokantoj; multaj fumis kifon****. el specialaj pipoj kun tre malgranda fometo. Unu el ili proponis al mi pipon. Sen atendi mian

* *Homo sapiens*: la zoologia nomo de la nuna homa specio.

** Ludwig Uhland: "*Der gute Kamerad*".

*** Vd. "... el la kara infaneco", § II, 4.

**** Stuporiga herbo, iel simila al haŝiŝo.

respondon, Ali tuj intervenis malpermeso: "Tio estas danĝera drogo, li diris al mi: tion vi ne devas fumi." Kaj li severe alparoli en sia lingvo la alian, kiu ne insistis.

Jes, li estis bona kamarado, vera amiko.

Li estis...

Mi vidis lin lastafoje antaŭ ol reforiri al Aleso; de tiam pasis monato.

Kaj venis informo: hieraŭ Ali subite mortis.

Nun mi scias, kial li, tiel sanaspekta, estis lokita inter la nekuraceblaj: li havis kuglon eniĝintan en la diko de lia kormuskolo*. La kuglo dum monatoj ne moviĝis. Jen ĝi traboris la muskolon, krevigis la koron.

Antaŭvidita fino de tiu juna vivo. Antaŭvidita, sed ne de mi. Mi volas kredi, ke ankaŭ li ne sciis pri la konstanta mortdanĝero, kiun li portadis en la koro...

8. Bela somero. Vivo ŝprucas.

Florako, 16an de aŭgusto 1917.

"Mi vidis vin hieraŭ kun la bela Ivona M." La kamarado, kiu tion diris, alesa liceano, estas ano de la ĝoja bando, kun kiu ĉiutage mi min banas en la rivero. Li parolis sen malica intenco, afable, kun komplica rideto. "Ŝi estas mia kuzino." Kial mi respondis abrupte, preskaŭ malafable?

Mia kuzino Ivona... Mi retrovis ŝin post preskaŭ tutjara foresto. En unu jaro adoleskanta knabino sin elvolvas kiel floro en printempa mateno. Ŝi estas 17-jara kiel mi. Nun mi scias, sen plua dubo: mi amas ŝin.

Ŝi rigardas min: la brilo de siaj okuloj, grizverdaj kun oraj pajleroj, trafas min rekte en la koron. Ŝi parolas: la tembro de ŝia voĉo kaj la nuanca modulado profunde emocias min. Ŝi kantas: ŝia soprantono, perfekte ĝusta kaj mirinde klara, estas ravo. Ŝi ridetas: la belkurba arko de ŝia buŝo, ruĝa sen ia ŝmiraĵo, kaj ŝia malsupra lipo, ŝveleta kiel fruktopulpo, nevenkeble kaptas miajn okulojn. Ŝi moketas min, kun maliceta flankrigardo. El ŝi en ĉiu momento elradias sorĉo, al kiu mi ne povas rezisti.

Ĉu eble, ankaŭ ŝiaflanke...?

For de mi tian penson! Mi ne volas scii. Mi volas nur silente ĝui la ĉarmon de la kunestado. Ankaŭ ŝi ne sciu - se eble...

* Nune, la progresinta kirurg-arto scipovus kuraci kaj savi lin.

Mendo, 24an de aŭgusto 1917.

Ni venis kune por pasigi kelkajn tagojn ĉe la geonkloj de Ivona, la gepatroj de nia komuna kuzo Fernando.

Ni promenas kun maturaj personoj, marŝante je kelka distanco de ili, aŭ, iafafoje, ambaŭ solaj. Ŝi parolas, jen serioze, jen petole kaj kokete. Mi plejofte silentas, por la plezuro aŭdi nur ŝin. Ni marŝas flanko ĉe flanko en la mallarĝa "Aleo de la Suspiroj", kie ni renkontas neniun. Mi tenas min plej apude, sed evitas tuŝi ŝin. Mi strabe rigardas al ŝia delikata profilo, al ŝiaj longaj okulharoj, al ŝia gracia kolo, al ŝia belforma brusto, kiu firme sin tenas sen la helpo de mamzono. Mi luktas kontraŭ deziro ĉirkaŭpreni ŝian talion... Ne, tion mi ne faros!

30an de aŭgusto 1917.

Ivona ofte portas pajlan ĉapelon kun larĝa rando supra kaj blua rubando, kiu bele ombras ŝian vizaĝon kaj flate sidas al ŝi. Hodiaŭ, por ekskurso en arbaro, ŝi surmetis ruĝan vaskan bereton, kies koloro harmonias kun ŝia helkaŝtana hararo. Ŝi estis simple vestita per korsaĵo el malpeza ŝtofo kaj mallonga jupo. Kutime ŝiaj kalkanumoj faras ŝin iomete pli alta ol mi, sed hodiaŭ, kun plataj ŝuoj, ni estas samstaturaj.

Ŝi marŝas bone, sed ne timas kuri. En la arbaro, laŭ kruteta deklivo, ni longe kuris rapide sur la glata tapiŝo el pinfolioj, ĝis ni kune alvenis al la bordo de rivero. Ŝiaj vangoj estis ruĝaj, ŝiaj okuloj ekscite brilaj. Ŝi anheletis, kaj sub la delikata ŝtofo ŝiaj mamoj takte leviĝis. Ŝi senĝene rigardis min rekte en la okuloj. Tumulton mi sentis interne... Kapti ŝin en miaj brakoj, premi ŝin al mia brusto, kisi ŝian duone malfermitan buŝon... Ne! nepre ne! Mi rigidiĝas en rifuzo.

Kredeble ŝi jam scias, ke mi amas ŝin (aŭ almenaŭ ŝin deziras). Certe tio estas videbla, kaj mi kredas, ke knabinoj tion perceptas per sagaca intuicio. Eble ŝi reciprokas, aŭ pretas akcepti mian amon?... Mi ne scias, ne volas scii.

Ne pro timemo - kvankam mi ne estas tro memfida.

Ne pro fideleco. Mia unua amo el la kara infaneco konservas en mia koro sekretan lokon, sed post ses jaroj mi rezignis pri ĝi, kaj ĝi estas eklipsita de la nova.

Sed mi estas 17-jara. Unu jaron plie, baldaŭ min kaptus mobilizo. Du jarojn plie, mi jam baraktus en bataloj. Tiu aĉa milito eterniĝas, neniun kapablas antaŭvidi ĝian finon. Eble mi devos partopreni en la interpopola buĉado.

Aŭ en alia armita luktado: diversloke aŭdiĝas krakoj, kiuj ŝajne anoncas periodon de krizoj kaj revolucioj.

Al mia necerta sorto mi ne ligu amatan knabinon. Se mi mortos, eble ŝi gardos dolĉan memoron pri tiu ĉi bela somero. Sed mi ne volas, ke ŝi funebru pri vivo detruita kaj forperdita revo. Mi volas, ke ŝi plu vivu, kaj, se eble, feliĉe vivu..

Ĉu mi estas tro romantika? En mia disŝirata koro interbatalas la impulso de mia juna ardo, la freŝa amo, kiu deziras vivi, kaj la idealo, kiu postulas sendividan sindediĉon - la "devo ordonanta". En mia memoro resonas la malgajaj versoj de Zamenhof, kiujn mi tiom admiris kaj parkeris.*

9. Morto ree kaj ree frapas.

Septembro 1917.

Ni konservis amikajn rilatojn kun Filomena, la eks-amatino de mia patro**, ŝia edzo kaj ilia filo Gastono, du jarojn pli aĝa ol mi: gaja kaj sprita junulo, kies konversacion mi tre aprecis.

De Marsejlo, lastan monaton, forveturis pasaĝersipo transportanta trupon al la franca orienta armeo. Ĝia celo, Tesaloniko, neniam estos atingita. Meze de Mediteraneo ĝi renkontis germanan submarŝipon. Unu torpedo sufiĉis: trafite sub la floslinio, la truptransporta ŝipo tuj sinkis.

Ĉiuj okupantoj pereis.

Inter ili estis Gastono.

.....

Hodiaŭ ni ricevis karton kun nigra rando:

"Ni havas la doloron informi vin...

... Leŭtenanto Petro R., 19-jara,
mortinta pro Francio".

Petro, 19-jara, kaj jam leŭtenanto: li do volontuliĝis. Tio ne mirigas min.

Li apartenis al riĉa marsejla familio, parte aristokrata, parte komercista. Mi ekkonis lin en somero 1911, en Langonjo***, kie lia patro posedis grandan domon. Malgraŭ ĉio, kio nin disigis - deveno, socia situacio, ideoj - inter ni ambaŭ naskiĝis reciproka inklino.

* "Mia penso" (Fundamenta Krestomatio).

** Vd. "el la kara infaneco", III.

*** Vd. "el la kara infaneco", XI.

Li estis bela knabo, svelta, vigla, sportema, ĉiam bonhumora; adorata de sia patrino kaj de siaj du fratinoj, kiuj nomis lin Peĉjo, kaj de ĉiuj amata.

Iam, duope promenante sur kampara vojeto, ni renkontis nigrasutanulon legantan sian brevieron. Petro flankeniĝis sur la dekstra rando de l' vojeto, kaj en respektoplena teniĝo salutis la pastron. Mi demandis: "Ĉu vi konas lin? - Ne", li respondis. Kaj li aldonis, en formo de nediskutebla aserto: "Sed ekleziulo ĉiam devas esti salutata."

Mi konstatis ankaŭ, ke en ĉiu okazo li same salutis la nacian flagon. Lia patriota sento estis tiel eksterduba kiel lia kredo al Dio kaj al la katolika religio.

Tial mi ne miras, ke li en frua aĝo volontuliĝis, kaj baldaŭ fariĝis oficiro. Jen estas almenaŭ unu, kiu neniel dubis pri la idealo, por kiu li oferis sian junan vivon.

Ho Peĉjo, ĉu tiu penso povus mildigi la doloron de afliktitaj patrino kaj fratinoj?

Al ili mi ŝuldas kondolencan leteron. Kion mi skribu?...

28ann de septembro 1917.

Fernando mortis!

Fernando, la pliaĝa kuzo de Ivona kaj mi, kiu estis al mi kiel granda frato.

Fernando, kiu ses jarojn seninterrompe portadis militistajn vestojn; kiu trapasis senvunde ĉiujn batalojn en Loreno, en Belgio, en Ĉampanjo, ĉe la Mozaj altaĵoj; kiu ĉiam senplende elportis la penojn kaj lacecojn, kaj la vivaĉon en la ŝlimo de la tranĉeoj.

Lastatempe ni estis iomete trankviligitaj. Li estis en Verduno, kun posteno en la urbo mem. Tie fine kvietiĝis la giganta batalo. Li estis nomumita serĝento-poŝtisto ĉe la divizia skalo. Li ne vivis plu en la tranĉeoj; li per ĉevalveturilo transportadis korespondaĵojn de Verduna kribrocentro al la regimentaj komandpostenoj, de kie aliaj portis ilin al la linioj. Tio estis favora, enviinda komisiio.

Fernando, kun kolego sur la veturilo de li kondukata, iris trankvile sur vojo ĉe rando de la urbo. Obuso vipe falis, eksplodis, frakasis la ĉaron, mortigis la ĉevalon kaj la du virojn.

Kamarado skribis al liaj gepatroj: "Li eĉ ne havis tempon por ekkonscii pri la okazo. Estas konsole scii, ke li mortis sensufere." Konsole!...

La kamarado sendis lian poŝhorloĝon kaj la difektitan paperujon,

kiu, portate sur la koro, iam deviigis kuglon kaj tiel savis lian vivon. Tiun tagon la morto ŝajne lin domaĝis. Sed ĝi daŭre gvatadis, kaj ĝi atendis lin sur tiu vojo.

Ho Fernando, Fernando kara!

Ho kompatindaj gepatroj!

10. La Kanto de la Ĝirondistoj.

17an de oktobro 1917.

"Morti pro la Patrio

Estas sorto la plej bela, la plej inda je envio..."

La kanto de la Ĝirondistoj...

Kiu, hodiaŭ, en tiu kafejo-restoracio?...

" - Mi scias, diris kamarado: estas bankedo de sesdekjaruloj, kiuj celebras la kvardekan datrevenon de sia rekrutiĝo. Tro junaj por la milito de 1870, tro maljunaj por tiu ĉi."

Kiel tiuj sentaŭguloj aŭdacas kantaĉi tiujn vortojn? Stultaj vortoj sendube, sed almenaŭ la Ĝirondistoj, kantante dum ili supreniris al la eŝafodo, havigis al ili ian noblecon. Sed tiuj dikventraj trankviluloj, sidantaj ĉe tablo abunde garnita per riĉaj rostaĵoj kaj vinoj, en komforta manĝosalonego!

Bonŝancaj ili estas, ke tie ne pasas iu vilulo: kun kia plezuro mi vidus lin reŝovi la himnon en la gorĝon de tiuj maljunaj kretenoj!

11. Pacemo en oriento, "ĝisfinismo" en okcidento.

20an de decembro 1917.

Komence de la lasta monato, la bolŝevistoj ekprenis la potencon en Petrogrado.

De la dua konferenco "de Zimmerwald", kiu okazis en alia svisa urbeto Kienthal, estis laŭtigita nova alvoko por senkondiĉa paco. En tiu konferenco, kiu kunigis anojn de ĉiuj militantaj landoj, Lenino kaj Trocki ludis influan rolon. Nun tiuj du viroj estas regantaj en Rusio, dank'al subteno en la tuta lando de la sovetoj de laboristoj kaj soldatoj. La rusa popolo aŭdis la alvokon. La frontaj trupoj ribelis, komencis fratumadi kun la kontraŭaj. La germana komandantaro vidas kun timo la kontaĝon de la novaj ideoj, kiuj danĝere disvastiĝas inter ŝiaj soldatoj. Tial, anstataŭ ekspluati sian nunan superecon por invadi Rusion, ĝi konsentis subskribi armisticon kun la nova revolucia registaro (15an de decembro).

Ĉu finfine, tra la plurjara nokto, kiu kovris Eŭropon, leviĝas en oriento la matenuro de baldaŭa paco? kaj granda espero pri emancipiĝo de la proletaro en la tuta mondo?

Dume, en Francio daŭre regas la "ĝisfinistoj". La soldataj ribeloj de la lasta printempo, draste briditaj, rapide fiaskis. La ĉasado al defetistoj tenas la tutan landon en subprema polica atmosfero.

La 16an de novembro, Clémenceau, la "Tigro", fariĝis ĉefministro. Al ĉiu demando pri io ajn, la maljuna kanajlo obstine respondas: "Mi faras militon". Ankoraŭ unu, kiu ne militis en 1870-71, kvankam li estis iel ligita al la Komuno kiel urbestro en Montmartre. Kune kun prezidento Poincaré, "Poincaré-la-Milito", jen estas bela paro! Ankaŭ laŭ ili, morti por la patrio estas la plej bela, plej enviinda sorto - por aliaj!

Ho! certe, al tiaj viroj ne mankas fizika kuraĝo. Ifoje oni vidas unu aŭ la alian, en militist-aspekta kostumo, viziti tranĉeojn. Poincaré ornamas sian kapon per ĉasista kaskedo, Clémenceau sin kapvestas per la "horizontblua" kazerna ĉapeto. Ili surmetas grizan surtuton kiel Napoleono, kaj per botoj tretas la ŝlimon de la fosajtoj - neniam longan tempon: ili ja havas aliajn pli gravajn okupojn!"

Karnavaluloj! Kaj la stulta publiko aplaŭdas tiujn histrionaĵojn. Sed, kiel la viluloj ne forpelas tiujn pajacojn per piedbatoj al la postajtoj?

12. Trajektorioj.

23an de decembro 1917.

Jen alvenas la ĵarfina ferio.

Pasis jam unu jaro, de kiam min trafis tiu malsano, kiu forigis min de la lernejo. La 1-an de oktobro mi reiris en ĝin. Mi retrovis ĉiujn lastjarajn kunulojn, kiuj malsukcesis en la konkurso. Ili reakceptis min kun ĝojo. Same la afablaj ĝeinstruistoj - inter ili aparte mia eks-malamiko la "Vilulo". Bedaŭrinde mankas nia bonega instruisto pri matematiko, S-ro L., mobilizita.

Komisie de la tuta klaso, mi skribis al li. Responde mi ricevis belan leteron, en kiu li parolis preskaŭ nur pri ni. Unu sola aludo al la milito kaj al li mem: "Mi esperas baldaŭ troviĝi inter vi, se nur mia trajektorio ne interkruciĝos kun tiu de iu pafitaĵo".

* Tio memorigas pri kanzono, kiu trafis grandan sukceson en tiu epoko:
"Kiam ni revenas forpermese

.....
Oni kondukas nin al kinejo
(Tie) ni vidas Poincaré sur la fronto,
Kiam ni revenas forpermese."

V. 1918

1. El oriento lumo?

4-an de marto 1918.

Depeŝo de Trocki kaj Joffe, datita de la 3a de marto: "Ni subskribis, kun ponardo sur la gorĝo, la hontindan traktadon de Brest-Litovsk".

Hontinda? Por kiu? Ĉu ne por la germanaj militaristoj, kiuj per la forto de la armiloj trudis tiun diktaĵon al armeo decidinta ne plu batali?

En tiu afero, kiuj estas la veraj venkintoj? Ĉu la germanoj, kiuj restas sklavo de la disciplino, aŭ la rusaj soldatoj, kiuj liberigis el ĝi, skuis la caran potencon, kaj rompis la militistan jugon?

Hieraŭ en oriento leviĝis la suno de paco. Kiam ĝi lumigos ankaŭ nian okcidenton? La rusaj amasoj montris la vojon: kiam ĝin sekvos niaj pli evoluintaj popoloj?

2. Espero ekfloris - kaj velkis.

.....

"En la nomo de la ministoj de Ganjero, mi portas al vi saluton fratecan, sindikatanan kaj revoluciistan".

Tondras aplaŭdo en la plenplena halo de la alesa laborborso*. La amaso konsistas precipe el strikantaj metalurgiistoj kaj ministoj. La parolanto estas svelta junulo kun bela malgrasa vizaĝo, nigra hararo kaj flamaj okuloj. Lia varmatembra voĉo vibras de kontaĝa fervoro.

Apud mi maljuna metallaboristo, veterano de sindikataj luktoj, skuas la kapon, kaj diras al mi: "Vidu, kamarado: tiu knabo, kiel faka laboristo, estas mobilizita ĉe la minejo. Li certe konscias, ke en

* Domo de la laboristaj sindikatoj. Vd. PIV.

tia okazo li estos tuj sendita al la fronto. Tamen li ne hezitas. Kuraĝulo!"

Nun parolas la delegito de la departementa sindikat-unio en Nimo. 50-jarulo kun pinta barbeto. Li komencis en sobra tono, kiu iom post iom ardiĝos. La ĉeestantaro aŭskultas silente, en streĉa atento.

"Kamaradoj, la kongreso de la minoritataj sindikatoj en San-Stefano difinis al ni precizan taskon. Nia striko havas nur unu celon: postuli de la registaro, kaj trudi, ke ĝi oficiale publikigu siajn milito-celojn.

"Iuj riproĉos, ke tio estas politika striko. Jes, politika ĝi ja estas. Hodiaŭ ni ne defendas profesiajn interesojn, ni batalas por la bono de la tuta homaro. Ni luktas, aparte, por niaj fratoj, kiuj jam tro longe suferadas en la infero de la tranĉeoj. Ili pretas ribeli, se ili nur sentos efikan helpon kaj subtenon de ni laboristoj.

"Niaj reprezentantoj en Zimmerwald kaj Kienthal klare analizis la situacion. La proletoj ne havas patrion, ili sin interbuĉas por la nura profito de kapitalistaj posedantoj kaj de imperialistaj ambiciuloj. Tiu ĉi milito ne estas nia afero, ĝi devas ĉesi kiel eble plej baldaŭ. Sufiĉe da mortoj, sufiĉe da suferoj, sufiĉe da ruinoj! Pacon, pacon sen aneksoj kaj sen monkompensoj, pacon senkondiĉan, tuj! Kaj ili finis sian vokon per la moto de la Unua Internacio: Proletoj el ĉiuj landoj, unuigu vin!"

Ondo de aplaŭdo kovris lian voĉon, spontanee elŝprucis "la Internacio". Ĉiuj kantis - krom unu en la fundo de la halo: civilvestita policano, de ĉiuj konata. Membro de la urba polico, li estis tie deĵoranta. Li faras sian metion honeste, sed sen troa fervoro, kaj estas rigardata kiel ne malsimpatia.

Nun la delegito reprenis la parolon:

"Kamaradoj, ni estas minoritataj en CGT*, sed, se ni firme tenos, baldaŭ ni konkeros la plimulton. Tion antaŭsentas la centra instanco. Tial ĝi ne kuraĝas nin kondamni; ĝi ŝajnigas eĉ subteni nin, sed mole. Fakte, ili ankoraŭ ne alprenis firman sintenon, ili hezitas antaŭ grava respondeco. Sed la CGT, kamaradoj, ne estas ili en Parizo: ĝi estas ni ĉiuj, militantoj de la bazo, ni ĉiuj en la tuta lando. Ni iru antaŭen, kaj ni devigos la ĉefojn sekvi nin.

* Confédération Générale des Travailleurs (Ĝenerala Labor-Konfederacio).

"En tuta Francio, en tiu ĉi horo, kunvenas samaj popolamasoj kiel nia. Hieraŭ en Parizo, la vasta Pré-Saint-Gervais estis kovrita de miloj kaj miloj da strikantoj. En timiga aŭ provoka intenco Clémenceau sendis aeroplanon de la polico, kiu tanĝe superflugis la manifestacion; niaj parizaj kamaradoj ne lasis sin impresi per la manovro de la krima maljunulo. Kaj ĉiuj urboj nun leviĝas. Ni aŭdis, ke en Avinjono la ruĝa flago flirtas sur la belfrido de la urbodomo*.

"Kamaradoj, ni estas la nombro, ni estas la forto. Per nia unueco ni trudos niajn elektitajn gvidantojn al firma agado. Aŭ ili okupos sian postenon ĉe la kapo de nia movado, aŭ nia nerezistebla impeto forbalaos tiujn hipokritulojn. Kaj ni venkos!"

La tuta ĉeestantaro, elektrita, aplaŭdis, kriis, bruis. En tumulto, per levitaj manoj, ĝi akceptis energian rezolucion: la strikantaj laboristoj unuanime postulas, ke la registaro tuj publikigu siajn milito-celojn, kaj oficiale sin deklaru preta por negocado, celanta al paco.

Inter ili troviĝis ankaŭ kelkaj studentoj kaj gimnazianoj kiel mi. Plenfide kaj tre ekscitite, ni disiĝis en bona ordo.

... (kelkajn tagojn poste)

Mi revenas de la laborborso.

Oni tie laŭtlegis tre dubsencan telegramon de la pariza centralo. Ĝi lasas supozi, ke la celo de la striko estas atingita, kaj ordonas tujan reiron al laboro.

Kelkaj aplaŭdis, kredante pri reala sukceso. La aplaŭdo sonis malvigle, kvazaŭ heziteme. K-do L., la departementa delegito, ne estas konvinkita. Kune kun li, pluraj akrevidaj malfidemuloj provis diskuti, postuli pli klarajn kaj precizajn informojn. Vane. La amaso estis jam laca. La entuziasma flamo estingiĝis.

Per voĉdono la plimulto konfirmis la decidon de la supera instanco. La striko estas finita.

Mi spertas amaran senton pri fiasko, pri malvenko. Do tiu bela movado, graveda de tiel granda espero, mizere abortis.

Kiel longe plu daŭros la longa plago? Kiam la dormantoj vekigôs?

* Falsa informo, kiel ni poste sciis.

3. Patro rakontas. Onklo rakontas.

.....

Mia patro tute resaniĝis. Nun li komencas rakonti, al mi sola, kelkajn el siaj spertoj de batalanto.

" - Ni deĵoris en unualinia tranĉeo, en trankvila sektoro. Jam plurajn tagojn ni apenaŭ povis aŭdi malproksiman gruntadon de kanonoj. La ĉiutaga komputado de falintaj obusoj diverskalibraj, pri kiu mi devis detale raporti, resumiĝis al nulo. Ni pasigis nian tutan tempon per aranĝado de niaj ŝirmejoj por havigi al ni kiel eble plej grandan komforton - tre relativan.

"Iun tagon la "teritoriana" plotono apud mia estis anstataŭita de "alpaj ĉasistoj" el la aktiva armeo sub komando de tre juna leŭtenanto freŝe promociita el Saint-Cyr*.

"Instalinte sian plotonon, li baldaŭ ordonis pafadon al la kontraŭa linio, distanca je kelkdekoj da metroj. Al tiu simpatia junulo, kiu povus esti mia filo, mi demandis: "Kial tiu iniciato?" Li respondis: "Nu, se oni ne pafas, tio ne estas milito!"

"Efektive: ni preskaŭ forgesis, ke ni estas en milito. Mi konkludis: "Bone. Vi vidos, kio sekvos."

"Ne pasis longa tempo, antaŭ ol li ja vidis. Al la fusiloj de liaj ĉasistoj respondis tiuj de la kontraŭaj infanterianoj. Baldaŭ ektondris tranĉeaj bombjetiloj. Poste kanonoj: germanaj 77, francaj 75, aŭstraj 88. Sekvis pli dikkalibraj: 115, 120, 155... Sur larĝa fronto etendiĝis la infera muziko. La pireteknika festaĵo daŭris tutan tagnokton; ĝis, kredeble, la du komandantaroj komprenis, ke ne temas pri serioza afero, kaj ordonis pafoceson al siaj artilerioj.

"Inter miaj maljunaj spertuloj neniu estis trafita. El la freŝbakitaj ĉasistoj, malpli instruitaj al singardo, pluraj ricevis vundojn, feliĉe ne tre gravajn; tamen sufiĉe por necesigi evakuon.

"Mia juna kolego, kuraĝa sed ne stulta, komprenis, kaj ne plu fanfaronis. Mi ne estis tiel kruela, ke mi triumfus de mia pruvita praveco."

" - Iun tagon, mi kondukis taĉmenton de malantaŭa ripozejo al dualinia pozicio. Tie ne estis komunika tranĉeo: ni devis trairi nudan ebenaĵon. Ni ĵus transpasis ĝian mezon, kiam komenciĝis artileria rulpafado. La obusoj falis antaŭ ni, kaj iom post iom la eksplodoj proksimiĝis. Miaj kunuloj, timigitaj, haltis. En unu ekrigardo mi juĝis la situacion: tro malfrue por retroiri, la moviĝanta

* La franca infanteria kadet-lernejo.

bombardo baldaŭ nin atingus; resti ĉeloĉe, sur tiu senŝirma glataĵo, estus plej danĝere. Unu nura solvo: fuĝi antaŭen, por plej rapide trairi la kontraŭdirektan strion de la obuspafado. Mi ordonis: "Disiru tirajlore, kaj antaŭen! - Ne! prefere morti ĉi tie! - Mi respondecas pri viaj vivoj. Se vi mortos pro malobeo, kulpa estos mi. Restos al mi nur unu farendaĵo. En mia revolvero estas ses kartoĉoj; unu sufiĉos: mi pafos en mian kapon. - Adjudanto, vi ne farus tion! - Jes ja, mi farus. Sed ni ne havas tempon por diskuti. Tirajlore, antaŭen!"

"Mi ekkuris, ĉiuj sekvis min. Ni trapasis sub la hajlo de la obusoj, nin ĵetante sterne al tero je ĉiu eksplodo. Atinginte la ŝirmon de la tranĉeo, mi vokis nome ĉiun el miaj kunuloj. Neniu mankis, neniuj estis vundita.

"Mia adjudanto, diris unu, vi savis niajn vivojn. - Ne: vi mem savis vin, ĉar vi komprenis, ke mi estas prava."

"Mi ne konfesis: dank'al blufu. Ĉar, kiel vi scias, mia revolvero neniam estis ŝargita."

" - En ripoza kantonmento, en parte detruita vilaĝo, mi kun kelkaj viluloj sidis sur rubaĵo, interbabilante.

"Rajde pasis generalo kun staboficiro. Mi rekonis lin: Pétain, la generalisimo; tiu, kiu, por refirmigi la disciplinon, ordonis, ke en la ripozperiodoj oni okupu la soldatojn per ekzercoj kaj diversaj neutilaj taskoj. Mi devas konfesi, ke niaj oficiroj, la veraj batalantoj, kiuj en la tranĉeo dividas nian vivon kaj niajn suferojn, ne volonte observis tiun ordonon, kaj fakte ne aplikis ĝin.

"La generalo direktis al mi sian aŭtoritatan rigardon, kaj mi aŭdetis lin grumbli sub sia dika lipharo: "Kion faraĉas tiuj pigruloj?"

Du aŭ tri el miaj kunuloj, ankaŭ rekoninte la superestron, reflekse faris ekmoveton por starigi, eble saluti. Flanka malaproba rigardo de mi, apenaŭ perceptebla mansvingo... ili residiĝis.

"Tiam mi turnis mian rigardon al la generalo, rekte en la vizaĝon. Li ŝajnis, kvazaŭ li nenion rimarkus, kaj daŭrigis sian iradon."

Mi elektis inter aliaj tiujn tri rakontojn, kiuj plej nete signas la karakteron de mia patro. Li diris ilin tre simple, tute senafekte, kaj, kiel mi jam notis: nur al mi.

Onklo Leono estas nun telefonisto. Li instalas tranĉeajn dratliniojn kaj aparatojn. Tio havigas al li okazojn por viziti komandpostenojn.

Ankaŭ, iafoje, por aŭdi, ĉu hazarde, ĉu intence, pli-malpli sekretajn interparolojn.

Li notis jenan inter majoro komandanta regimenton kaj kolonelo funkcia kiel brigadestro*.

La majoro: " - Mia kolonelo, mi ricevis la ordonon de la ĉefstabo, kiun vi transsendis al mi. Ĝi estas vera frenezaĵo!

La kolonelo: - Mi tute samopinias. Sed ĝi estas ordono...

M - Neniam ni atingos la difinitan celon.

K - Certe. Estas absolute neeble...

M - Kaj mia regimento iros al teruraj perdoj...

K - Ba! Sudlandanoj kaj ĉampanjanoj... Post la milito, ĉiam restos sufiĉe da tiu semo de revoluciistoj!**..."

4. Mia "frato" Roĝero.

18an de majo 1918.

Roĝero, apenaŭ du jarojn pli aĝa ol mi, estis antaŭ kvin monatoj mobilizita, kaj troviĝas jam nun ĉe la fronto (la instruado de la rekrutoj estas ege akcelita).

Li estas studento en instruista lernejo en Nimo. Ni konatiĝis antaŭe en Aleso, kaj tuj malkovris inter ni reciprokan simpatian. Mi havas aliajn amikojn, mi amas ilin, kvankam niaj opinioj iafoje malsamas. Kun li, male, pri preskaŭ ĉiuj temoj, ni havas komunajn ideojn. Mi nomas lin frato mia, kaj reciproke.

Ni interŝanĝas oftajn leterojn, kaj ĉiusemajne mi sendas al li en koverto ekzempleron de "La Vague" (Ondo), socialista pacista gaze-

* Dum la milito, ĝenerale oficiro okupis postenon normale difinitan por senpere pli alta grado.

** Ribelaj strikoj de vinberkulturistoj en Langvedoko (1907) kaj en la ĉampanja departemento Aube (1911) kaŭzis gravajn malfacilaĵojn al la tiama registaro.

to eldonata de deputito Pierre Brizon, unu el la "pilgrimantoj" de Kienthal. Tiu dika koverto ne povas pasi nerimarkite, tamen ĝi ĉiam regule alvenas. Ĉu inter la militistaj cenzuristoj troviĝas sekretaj simpatiantoj al niaj ideoj?

Cetere, la militarista-policiista reĝimo, kiu diktatoras nun en Francio, lasas aperi plurajn tiajn presaĵojn (ofte kun blankaj spacoj, ĉar la cenzura tondilo aktive funkciadas): satiraj kaj humuraj, kiel la "Katenita Anaso" kaj la "Blanka Merlo"; informaj-politikaj, kiel la "Ĵurnalo de l' Popolo"; kulturaj kiel "la Homoj de l' Tago". Clémenceau, eksa ĉefredaktoro de "Libera Homo", poste de "Katenita Homo"*, sin sentas sufiĉe forta por toleri tiujn misagordojn en la patriotisma koncerto, kies orkestrestro li estas. Tiuj gazetoj estas tro dikaj por sendado en leterkoverto, sed ofte mi sendas al Roĝero eltondaĵojn el ili.

Kompense li sendas al mi la "Bultenon de la Armeoj", substrekinte la plej rimarkindajn stultaĵojn. Da tiaj, mi konfesas, estas ne multaj. La redaktantoj de tiu oficiala organo estas bonaj psikologoj: ili konas la spiritostaton de la viluloj, kaj ne riskus ŝoki ilin per tro dikaj ŝovinistaĵoj; aŭ per nekredeblaj legendoj, taŭgaj por civiluloj.

Pere de li, mi scias ankaŭ, ke en la tranĉeoj kaŝe cirkulas flugfolioe la libro de Henri Barbusse, "**La Fajro**", kiu tre realisme priskribas la vivon de la viluloj.

En sia lasta letero Roĝero skribis:

"Mi partoprenis en atako per bajoneto. Terura afero: sin trovi tiel sensŝirme staranta sur ebena grundo, pli ol centmetra interspaco inter la unuaj linioj; en la taktaktak de maŝinpafiloj, miaŭoj de kugloj, disaj eksplodoj de grenadoj; kun la perspektivo renkonti same armitan kontraŭulon, kaj la nepra neceso lin mortigi aŭ esti de li mortigota! Nun mi scias, kio estas timo. Kaj mi komprenas la signifon de la esprimo: fuĝi antaŭen."

Mi konas la kuraĝon de mia frato Roĝero. Ofte mi vidis lin alfronti naturajn danĝerojn: grimpi ĉe altaj arbotrunkoj, muroj aŭ vertikalaj ŝtonegoj; transsalti super rokfendoj; malsupreniri en grotajn profundaĵojn, sen antaŭa esploro, sen zorgo, malsingardeme. Jes, kuraĝa li estas, eĉ troriskema. Kaj nun: "mi scias, kio estas timo!" Ho Roĝero, kara frato mia, pro tiu senartifika konfeso, mi ankoraŭ pli amas vin.

* Sinsekvaj titoloj de gazeto fondita de Clémenceau dum li staris en la parlamenta opozicio.

5. Rekrutrevizio. Barcelono?

.....
Venis la tempo de la sanstatrevizio por mia rekrutklaso. Kompreneble, mi estas akceptita kiel "taŭga por la aktiva militservo".

Por ni tio ne estis festotago, kia ĝi estis por la antaŭmilitaj rekrutoj. Ni ne paradis sur la stratoj, ebriaĵoj de alkoholo kaj ĝojo, kantante kaj kisantante knabinojn.

Post kelkaj monatoj venos la enkazernigo; baldaŭ, post nelonga instruado kaj ekzercado pri uzo de diversaj armiloj, sendo al la fronto.

"Se la milito daŭros ĝis tiam - diris mia patro - ni migros en Hispanion. Mi havas en Seto kamaradon, kiu nin transportos per sia ŝipeto. En Barcelono loĝas jam tridekmil francoj, kaj sufiĉe multaj esperantistoj. Tie ni trovos laboron por ni ambaŭ."

Mi milde respondis: "Ne, patro, mi ne volas. Vi mem konsentis esti miksitaj en tiu afero, kiun vi malaprobas kaj abomenas. Ankaŭ mi. Ankaŭ mi eventuale devos ĝin kontraŭvole suferi. Kaj mi volas, post la milito, havi la rajton paroli tiel laŭte kiel ĉiuj batalintoj."

Mi pensis interne: "se mi revenos...". Sed mi ne elparolis tiujn vortojn, ĉar tie ĉeestis mia patrino. Ŝi nenion diris, sed mi vidis ŝiajn okulojn plenaj de larmoj. Mi kisis ŝin, kaj gaje diris: "Ne timu, patrino. Ĝis tiam povas okazi multo. La milito ne longe plu daŭros. Feliĉe Patro revenis por definitiva restado kun ni. La paco trovos nin triope kune."

6. Morto de instruisto.

.....
"Se nur mia trajektorio..."

Tio estis la lasta leciono pri geometrio kaj kinematiko de nia bona instruisto, S-ro L.

Lia trajektorio renkontis tiun de kuglo, kiu frapis lin en la frunton.

Jen estas la tria, pri kies morto ni funebras. La du aliajn ni ne longe konis. Ili estis junaj, kaj ilia frua forpaso, en la unuaj tagoj de la milito, tre impresis nin. S-ro L. estis pli matura homo, jam iomete kalva. Kun li dum kvar jaroj ni lernis matematikon. Ni ŝatis lian instru-metodon, ni alte estimis lian karakteron. Li havis naturan aŭtoritaton. Lia ironia duonrideto, liaj spritaj rimarkoj, ĉiam sen malico kaj sen plilaŭtigo de la voĉo, eĉ lia nordfranca parolmaniero, ĉio ĉi pli imponis al ni ol punoj, minacoj aŭ kriaĵoj

admonoj. Ni ne timis lin, sed ni respektis kaj estimis lin.

Nun ni ekkonscias, ke ni eĉ amis lin.

7. Somero. Ekzameno. Ferio.

25an de julio 1918.

En Nimo mi prezentis min por la unua parto de la ekzameno: la skribaj provoj kaj industria desegno. Mi estas certa pri altaj notoj en la fakoj matematika, fizika, kemia kaj desegna. Malpli pri la franclingva.

La temo proponita por disertaĵo estis facila, sed por mi insida: "Kiujn dezirojn vi formulas por morgaŭa Francio?"

Se mi intencus verki decan, konvenan tekston, konforman al la reganta spirito, mi certe ne sukcesus: mi povus skribi nur banalajn vortojn, gurditajn frazojn. Do, mi esprimu miajn sincerajn pensojn. Post mallonga priskribo pri la nuna stato de mia lando, ruinigita, elsangigita, perdinta multege el siaj plej valoraj filoj, mi prezentis la necesajn kondiĉojn por ĝia releviĝo, kiu cetere postulos longan tempon kaj multe da laboro.

Tiuj kondiĉoj resumiĝas en unu vorto: paco. Mi ne uzis eĉ unu fojon la esprimojn "glora venko" aŭ "venka paco". Kompense mi insistis, ke la bezono estas urĝa. Mi fine esprimis la deziron, ke paco revenu kiel eble plej baldaŭ. Kaj ke ĝi daŭru eterne: ke Francio, de nun, por ĉiam rezignu pri milito; ke ĝi vivu en harmonio kun ĉiuj popoloj, inkluzive la germanan.

Tia teksto odoras sulfuron, aŭ brulŝtiparon. Kiome ĝi estos taksita? Tio dependos de la ekzamenantaro...

Tamen mi esperas eviti eliminon, kaj esti akceptita por stariĝo al la dua parto, parola kaj manlabora.

Mendo, 15an de aŭgusto 1918.

Mi pasigis kelkajn tagojn en Florako, kaj venis ĉe la gepatrojn de Fernando, kies doloron iomete mildigas la ĉeesto de amantaj parencoj.

Krom tio, mi volis fuĝi for de Ivona, ĉar en mia pli kaj pli malgaja mensostato, ŝai kunesto estas al mi tortura. Plie, mi timas, ke iam mi ne havos plu la forton kaŝi al ŝi mian amon...

Sed, semajnon poste, ankaŭ ŝi venis tien ĉi.

Mi rifuĝas en laboro, pretekstante la neceson pretigi min por la konkurso. Sed mi ne scias rezisti al ŝiaj allogoj, kaj mem ofte provokas interrenkontojn. Kiam ni troviĝas ambaŭ kune, mi

forĝegas ĉion eksteran, kaj plene ĝuas la dolĉon de la nuna momento. Sed ĝuste tio estas plej danĝera!

Ho rava kaj turmenta sento!

8. Vivo kaj morto de junulo.

.....

Samaĝa kiel Roĝero, Maŭrico, malproksima parenco, vivis sian infanecon kaj sian junecon en Mendo, antaŭ ol fariĝi studento en Montpeliero, kaj poste rekruto en Kastro, en rajd-artileria regimento.

Mi vidis lin antaŭ du monatoj ĉe liaj gepatroj. Li estis granda kaj fortika - unu el la plej viglaj, bonhumoraj, vivoĝuaj junuloj, kiujn mi iam konis. Moviĝema, babilema. Li rakontis pri siaj spertoj de rajdisto, pri duonsovaĝaj ĉevaloj el Kanado, kiujn lia regimento ricevis por dresado, pri la manovrado de kanonoj, kaj pri multaj el siaj travivaĵoj de studento kaj de soldato. Li sprite pentris ilin, kaj farbis ilin per vivaj koloroj. Ne haltante en parolado, li dume manĝis kun belega apetito, samtempe funkciigante la langon kaj la dentojn. Li sidis sola ĉe tablo, servata de sia patrino, kiu kun evidenta plezuro vidis lin engluti tutan rostitan kokidon, trinkante glasojn da vino kaj daŭre parolante, mimante gajajn scenojn, ridante... Kia juneca ardo, kia vivoforto!

Li foriris al la fronto.

Li mortis.

9. Hispana gripo.

Mendo, 24an de aŭgusto 1918.

De antaŭ kelka tempo disvastiĝis en Francio grava epidemio nomata "hispana gripo" (ĉu vere ĝi devenas de Hispanio?). En iuj urboj ĝi jam kaŭzis multajn mortojn*.

Jen min trafis ankoraŭ tiu ĉi malsano! Kvazaŭ mi estus destinita ne preterlasi unu! Mi kuŝas en lito kun alta febro. Kaj postmorgaŭ, mi devus leviĝi je la kvina, por trajne iri al Marsejlo, kie okazos la konkurso. Mi dubas, ĉu mi povos.

Ĉu do, ankoraŭfoje, la sorto decidis nuligi mian esperon kaj la efikon de mia laborado?

* Laŭfame la "hispana gripo" faris en la mondo tiom da viktimoj, kiom la milito mem.

26an de aŭgusto, en Marsejlo.

Ankoraŭ tremante pro resto de febro, mi leviĝis hieraŭ frumatene per forto de volo. La vojaĝo daŭris plurajn horojn, kun du trajnoŝanĝoj. En la vagono, iom post iom, mi sentis mian staton pliboniĝi.

La trajno alvenis unu horon antaŭ la komenco de la parolaj provoj. Estis jam bela, varmega vetero. La mateno pasis sufiĉe glate. Mi ne brilis antaŭ la ekzamenanto pri historio kaj geografio (ekonomiaj) - temoj, kiujn tamen mi opiniis facilaj. Feliĉe mi multe pli sukcesis pri algebro kaj geometrio.

Restis la grava provo pri manlaboro. Kvar horojn, de la 14a ĝis la 18a. En la fako de mi elektita, alĝustigo de feraj pecoj, la proponita tasko estis relative facila. Mi ĝin atakis kun trankvila memfido, uzante unue ĉizilon kaj martelon.

Kaj jen la katastrofo: subita doloro fulme tranĉis en mia interno, de la dorso al la brusto, interrompante mian spiron. La forgesita gripo sin rememorigis. Mi penis daŭrigi, kunpremante la dentojn. Vane: ĉiu brakmovo estis neelteneble doloriga.

Mi haltis, sidiĝis, restis tiel senmova dum du plenaj horoj. La ekzamenanta majstro venis al mi, demandis, kio okazas. Li videble kompatis, sed neniel povis helpi.

Jam kelkaj kamaradoj preskaŭ finis la taskon. Kun malespero mi vidis la horloĝajn montrilojn senkompatate turniĝi...

Iom post iom, tamen, la doloro mildiĝis. Timeme mi reprenis la ilojn, kaj provis reeklabori. Marteli, ĉizi, fajli... laŭgrade miaj gestoj fariĝis pli rapidaj, pli efikaj, pli precizaj - malgraŭ la doloro, kiu ne tute forpasis.

Nun ĉiuj aliaj estis finintaj. Mi estis la sola, kiu redonis la taskon apenaŭ ĝustatempe plenumita, akurate en la lasta minuto. La ekzamenanto ĝin ricevis kun afabla rideto, kaj gratulis pro mia kuraĝo. Videble, tiu bonkora homo ĝojis pri mia fina sukceso.

Subite mi sentis min treege laca, sed kontenta. Espereble la rezulto estos bona.

10. Antaŭsignoj de la fino

Aleso... septembro 1918.

Ni estis ok kandidatoj. Ĉiumatene ni kuniĝas por iri al la stacidomo. Tie ni pruntas de la bibliotekistino la ĵus ricevitan "Oficialan Ĵurnalon". Tra ĝiaj multaj paĝoj ni serĉas, ĉu aperis la rezulto de la konkurso.

Hodiaŭ ĝi aperis. Ni febre tralegis la kvincentnoman liston. Jen estas, dise, la nomoj de sep el ni. Granda sukceso por nia lernejo.

Ni atingis la finon de la listo. Mankas la nomo de unu el la ok. Nian ĝojon moderigas lia malsukceso. Ni ne komprenas: li ja estis ne malpli kapabla ol ni. Kaj nun li atingis la aĝolimoŝ, li devos rezigni pri Artoj kaj Metioj, kaj elekti alian vojon. Li estis bona kamarado, ni ĉiuj bedaŭros lin. Tiel la vivo disigas kunirantojn.

Atendante la "Oficialan", kiu venas de Parizo, ni ĉiutage legis la novaĵojn en la regionaj ĵurnaloj, pli frue ricevitaj.

De post la danĝera, sed fine fiaska ofensivo de Ludendorf en la lasta printempo, la fronto ree stabiliĝis, la operacoj ŝajne stagnas. Tamen, je preskaŭ nepercepteblaj signoj, oni sentas, ke io ŝanĝiĝis.

20an de septembro 1918.

Mi ricevis returne cirkulantan poŝtkarton, kiun mi sendis en majo 1914. Ĝi estas karto dividita je kvin partoj. Ŝur ĉiu el ili, ĉiu sinsekva ricevinto respondas al kelkaj demandoj (kiom da loĝantoj en via urbo? kiom da esperantistoj? ktp.), alguas poŝtmarkon por internacia afranko, kaj sendas ĝin al nova adreso en alia lando. La kvina ĝin resendas al la unua.

Mi ĝin adresis al mia korespondanto Oskar Ziegler, eldonisto en Stutgarto, kiu ĝin sekvigis al Hindio. De tie iris al Aŭstralio, poste al Argentino, poste al Skotlando. Tiu kartonpeco ĉirkaŭvojaĝis la tutan mondon, vizitis samideanojn en kvin landoj, kaj reportis al mi iliajn mesaĝojn.

Inter la kvin poŝtmarkoj, estas unu kun la vizaĝbildo de kasko kapvestita "Germania". Laŭfame ĝi estas profila portreto de la imperiestrino: la bela edzino de Vilhelmo II-a, la iama fierulo kun pintaj lipharoj.

Mi diras "iama", ĉar mi vidis en magazino "La Spegulo" freŝdatan foton. La arogantaj lipharpintoj estas mallonge tonditaj, li lasis kreski grizan barbon, kaj la fizionomio perdis sian memfidan esprimon. Iuj vidas en tiu bildo simbolon pri laceco de la tuta germana nacio.

Laŭ atesto de neŭtralaj observantoj, la superregema popolo ja laciĝis kaj elreviĝis. En ĝi ŝtelpenetris ĝermoj de pacismo kaj revoluciismo. Ankaŭ ili havas siajn "defetistojn". Homoj kiel Liebnacht kaj Rosa Luxemburg senkaŝe manifestas ribelemon. En plena kunsido de Reichstag, la parlamento en Berlino, deputito

Haase kuraĝe ekkriis: "De tiu ĉi tribuno mi vokas la germanan popolon al revolucio."

Tiuj vortoj ankoraŭ ne levis laŭtajn efikojn. La amaso restas senforma kaj senmova, sed jam aŭdiĝas surdaj krakoj. Eble subtere maturiĝas revoluciemo.

Inverse, en Francio, spite la daŭrigon de vigla kontraŭmilita propagando, ŝajne renaskiĝis patriotisma espero pri venko. La fera mano de Clémenceau sentigas sian fortan premon. Post kelkaj sengravuloj, nun altrangaj burĝaj politikistoj favoraj al paco estas persekutataj. Eksĉefministroj Malvy, Caillaux estas arestitaj kaj enkarcerigitaj pro akuzo pri "sekretaj interkonsentoj kun la malamikoj".

La obstina Tigro sukcesis konvinki anglojn kaj usonanojn, ke ili metu siajn trupojn sub la unuecan komandon de la franca ĉefgeneralulo Foch, taksata kiel elstara strategiisto kaj energia ĉefo.

Dume, Usono ĵetadas sur la pesilon la tutan pezon de sia industria potenco. Oni povas konjekti, ke la fortorilata ekvilibro nun renversiĝis favore al la okcidenta koalicio. Kaj ke Foch, tenante enmane la plej timegindan batalrimedon el ĉiuj tempoj, metode preparas decidajn iniciatojn.

Ĉu do militista venko sur la batalkampoj? Tio ŝajnas al mi plej timinda perspektivo: ĉar en tia okazo, anstataŭ interkonsento de liberiĝintaj popoloj sur bazo de egaleco, la afero finiĝos per packontrakto trudita de unu militarista potenco al alia venkita. La historio instruas, ke tiaj diktatoj neniam certigas longan pacon. Ili semas en la koron de la venkitoj senton de humiliĝo, kaj ĝermigas sopiron al revenĝo. Ili kreas en la subigita popolo mizeron kaj malesperon, kiu pretigas ĝin por novaj frenezaj aventuroj. Ĉial kaj ĉiel ili preparas estontajn konfliktojn.

Ni tamen esperu: eble Wilson*, kiu ŝajnas idealisto, estos sufiĉe potenca por trudi al siaj kunliganoj prudentan moderecon...

.....

Onklo Leono rakontas:

"En mia sektoro alvenis usonanoj. Junaj, grandaj, fortikaj. Ilia freŝa haŭtkoloro, ilia gaja vizaĝesprimo, iliaj facilaj movoj kaj gestoj de fortaj sportuloj, ĉio el ili elmontras belan sanon. Inter ili kelkaj

* Usona prezidento, mortinta en 1924.

"nigruloj" diversnuancaj, se same grandaj, fortikaj, ridemaj. Ĉiuj vestitaj per novaj kaciaj uniformoj, kaj bone ekipitaj.

"Ili plantis fostojn portantajn tabulojn kun sago kaj surskribo: Saint-Mihiel.

"Ni mire rigardis, kaj ĉiuj viluloj levis la ŝultrojn: la germanaj pozicioj ĉirkaŭ Saint-Mihiel ĉe Mozo formis konveksan angulon, kiu penetris kiel kojno en la franca frontlinio. Sur la mapo, redukti tian angulon ŝajnis facile; sed ni sciis, kiel fortikigitaj estas tiuj pozicioj. Laŭ nia sperto, tia entrepreno estus nepre fiaskonta: Saint-Mihiel estis nekaptebla.

"Severa artileria preparado. Ĉu vere la ĉefstabo intencas riski tiun veton?"

"Kaj la junaj senspertaj amerikanoj, la freŝbakitaj soldatoj ekiris kantante... al malsukceso, al buĉfero, al morto..."

"Kaj ili sukcesis!"

"Tion ni ne povis kredi, tamen estis vere: Saint-Mihiel estis kaptita!"

"Ili venkis.

"Ili..."

"Post kiam ilin anstataŭis freŝaj trupoj, ni vidis reveni la venkintojn - tiujn, kiuj restis. Multaj kuŝantaj sur brakportiloj. La starantaj, stumbe marŝantaj, palaj, kun fiksa rigardo, kvazaŭ ebriaj de lacego. Kaj kiom pli malmultaj ol anatŭ la atako!"

"Ankoraŭ kelkaj similaj venkoj, kaj la tuta armeo de generalo Pershing kuŝos sub lignokrucoj..."

"Kompatindaj junuloj!"

20an de oktobro 1918.

Finiĝis la kvarjara pozicia milito. La abruptaj atakoj de Foch per amasigitaj fortegoj disrompis la fronton en pluraj lokoj. Li multobligis tiujn atakojn sur la tuta linio, kaj la grandega maso ekmoviĝis. Nun, ĉie la germanaj trupoj retiriĝas sub la pela premejo.

En Italio, same cedas la aŭstroj.

Jen ekruĝas la vesperkrepusko de la centraj imperioj.

11. Armistico.

Marsejlo, 4an de novembro 1918.

Antaŭ la preĝejo de la Karmelanoj sonis la virenergiaj tonoj de la

"*Marcia Reale*"*. Sur la vasta placo kaj la konverĝantaj avenuoj onde svarmas nigre densa popolamaso, el kiu elstaras trikoloraj flagoj: verd-blank-ruĝaj kun la savoja blazono meze de la blanko. Eksonis ĥorkanto: "*Frate-elli-d'Ita-lia...*"**. Forgesitaj, la nigraj tagoj de Caporetto***. Hieraŭ Aŭstrio kapitulacis. Unuaj inter la aliancanoj, la italoj festas sian finan venkon.

Nepriskribebla entuziasmo. La okuloj ekzaltite brilis, virinoj histerie kriis, nekonatoj sin interbrakumis kaj kisis. Mi scias, ke la itala popolo estas elmontrema en siaj sentesprimoj, sed en la amaso troviĝas ankaŭ francoj, same flamigitaj. La venko estas ĝenerala, totala. Ankaŭ ĉe la franca fronto komenciĝis la traktado por batalpaŭzo, la fino estas tuj proksima. La popoloj, faciligitaj, lasas eksplodi sian ĝojon.

... Kvazaŭ ili ne devus funebri pri milionoj da mortoj, tiom da kripligoj kaj amasegoj da ruinoj. Ĉu do la popoloj neniam lernos el spertado? Ĉu eterne ili restos neplenkreskaj?

Aikso-la-Provenca, 11an de novembro 1918.

Hieraŭ ni eniris en la lernejon kiel internuloj, kaj jam hodiaŭ ni ricevis elirpermeson: ĉi-matene en Rethondes estas subskribita la armistico. Sur la tuta longo de la fronto klarionoj sonoris "Ĉesigu la pafadon!"

Finfine!

La plej granda el ni trovis, mi ne scias kie, grandddimensian trikoloran flagon kun longa stango. Ĝin flirtigante li ekmarŝis ĉekape de unuopa vico, kaj ni defilis sur la "Cours Mirabeau", la bela urba promenejo, kantante alterne la Marseljezon kaj la "kanton de l' gadzartoj"****.

"Ni ĉiuj estas filoj de Francio,
Sanktega tero kara al niaj koroj..."

Verdire, mi ne partoprenis en la kantoj, kaj mi demandis min, kion mi tie faras. Tamen mi defilis kun la aliaj, ne dividante ilian entuziasmon, sed propravole akceptante la lernejan tradicion. Ĝi estas, laŭ mia opinio, la cemento de nia solidareco, la "gadzarta frateco", kaj la taŭga rimedo por kontraŭstari la ekscesojn de la ad-

* La reĝa marŝo (itale).

** "Fratoj el Italio", unuaj vortoj de la itala nacia himno.

*** Gravega malvenko de la italoj sub komando de generalestro Cadorna.

**** Lernantoj en Art-metiaj lernejoj.

ministracia aŭtoritato.

Ĉe la dua strofo mi kunigis mian voĉon al tiuj de la kamaradoj: "For la nobeltitolojn, ilia falsa brilo ne povas nin blindigi. Ĉi tie ĉesis malegaleco, finiĝis la tempo de privilegioj. Ni forĵetas ĉion, kio disigas. Frateco, jen estas nia devizo..."

Reveninte en la lernejon por rapida tagmanĝo, ni, tuj poste, dise reeliris tra la urbon. Ni travivis tumultan posttagmezon. Pri ĝi mi rakontos morgaŭ, ĉar estas nun malfrue, kaj mi dormemas.

12an de novembro 1918.

Antaŭ kelkaj tagoj, pro iu malklara motivo, ekestis disputoj kaj malpacigoj inter aiksaj studentoj kaj prostituistoj. Da tiuj venis hodiaŭ el Marsejlo multopa taĉmento. En diversaj urbaj kvartaloj ili provokis kaj atakis ĉiujn renkontatajn studentojn sendistinge: ĉu tiuj estas kapvestitaj per la larĝa bereto kun kolorrubando de fakultato, ĉu ili portas la longvizieran kaskedon kaj la uniformon de la gadzartoj: longa nigra mantelo kun orumitaj butonoj.

Tiel ni festis la finon de la bataloj per stratbataletoj kun tiu kanajlaro. La urba polico provis pacige intermeti sin, sed ĝi estis senpova. La interbatadoj daŭris ĝis malfrue en la nokto.

Feliĉe ne estis uzitaj pafarmiloj, neniu estis grave vundita. Nur unu el ni revenis kun sanga vundeto ĉe la frunto. Li havas bandaĝon ĉirkaŭ la kapo. Ni admiras lin kiel heroon, kaj precipe lin envias: ĉar li estas kuracata en la loĝejo de la pordisto, dorlotata de lia edzino, kaj flegata de lia bela filino, 18-jara kiel ni.

Hodiaŭ la direktoro prudente malpermesis al ni eliron el la lemejo.

Nun mi pripensas tiun hieraŭan okazon. Negrava afereto, ja. Sed eble simbole signifa. La "nervi"* atakis, jes. En ĉiu konflikto estas iu unua atakanto. Ĉiam la alia. Sed, miaopinie, ni agresitoj tro komplezeme akceptis la batalon, kaj reagis al forto per forto. Eĉ mi, kiu ĉiam fanfaronas pri mia pacismo, kaj kredas min vere pacema. Kiam ŝtonoj flugis, en mia kapo eksonis eĥo el la praava alesa "Tabó!"**

En la preciza momento, en kiu venis la paco, objekto de longa sopirado, la homa speco ankoraŭ ne perdis sian bataleman instinkton. Mi kredas, ke longe plu la homaro restos mergita en barbareco.

* Prostituistoj, kanajloj, en la mediteranea regiono.

** Militkrio de la mezepokaj alesanoj. Vd. "...el la kara infaneco", § IX.

Finleginte la kajeron, mi refermis ĝin kaj enpensiĝis.

La 28an de junio 1919, en la reĝa palaco de Versajlo, en tiu Galerio de Speguloj, kie naskiĝis en 1871 la dua Germana Imperio, la aliancanoj trudis al venkita Germanio drakonan packontrakton. La venkintoj ne sciis superi sian tro kompletan venkon. La Versajla diktato enhavis la ĝermon de la terura dua mondmilito.

Kvar jarojn poste, en okupata Rejnlando, mi ĉeestis unuajn sekvojn.

Mi aldonas epiloge kelkajn rememorojn el tiu periodo.

Epilogo

1. - En 1921, ricevinte la inĝenieran diplomon, mi estis rekrutita en infanterio. La superaj militistaj instancoj ja asertis, ke en moderna armeo, ankaŭ infanterio bezonas teknikistojn. Egale al mi!

Ok-monata instruado en Versajlo kaj en Saint-Maixent, la rezerv-oficira lernejo, kun laciga sed korpe saniga trejnado. En aprilo 1922, mi estis sendita kiel leŭtenanto al la 20a regimento de tuniziaj tirajloroj: hazardo min remetis al kontakto kun tiuj arabaj soldatoj, kies similulojn mi jam iom konis.

En tiuj afrikaj trupoj la graduloj, ĉu francaj, ĉu indiĝenaj, brutale traktadis la soldatojn. "Kredu min, ili diris: Ĉiuj estas mallaboremaj, mensogemaj, ruzaj, ŝtelemaj. Per mildo vi de ili nenion ricevos. Ili marŝas nur vipate, ili komprenas nur batojn."

Kontraŭe al tiuj spertuloj, mi provis apliki malajn metodojn. Kion mi riskus? nur unu jaron mi estis deĵoronta sub la uniformo. Iam mia kolonelo formale ordonis, ke mi punu soldaton, kiu malĝuste manovris. Mi ne obeis. Neniam mi punis. Iun vesperon, en kafejo, francaj ĝendarmoj volis aresti du tirajlorojn, kiuj, ebriaj, kaŭzis skandaleton; mi malhelpis ilin, uzante mian gradan superecon. Mi admonis la du kulpulojn kaj ordonis al ili tuj reiri en la kazernon; kontentaj, ke ilia afero tiel solviĝis, ili haste obeis. Ofte mi defendis soldatojn kontraŭ tro severajn suboficiojn aŭ kaporalojn. Kaj kiam inter sengraduloj okazis iu disputo, kverelo aŭ kontesto, ili volonte submetis la aferon al mi kiel al paciga juĝisto. Tiuj viroj, el kiuj kelkaj estis pli aĝaj ol mi, traktadis min kun granda respekto, dirante: "Mia leŭtenanto, vi estas mia patro."

Miaj kolegoj, profesiaj oficiroj, konstatis kun miro la rezultojn, kiujn mi tiel akiris. Pro tiaj etaj faktoj kaj pro aliaj detaloj en mia sintenado kaj en miaj paroloj, ili rigardis min kiel originalulon, cetere simpatian. Pere de iuj leŭtenantoj, kiuj amikiĝis kun mi, mi sciis, ke iafoje la superuloj parolas inter si pri mi. Unu majoro diris: "Li estas tre bona oficiro, sed... li ne estas militista!"

La tirajloroj, post kelktempa observado, senrezerve adoptis min. Ilia respekto ne fontis el nura disciplino. Ili dediĉis al mi veran sindonemon. Tion mi konstatis maltrankvile, konsciante, ke en

danĝeraj cirkonstancoj, ili estus pretaj oferi sian vivon por defendi aŭ venĝi min. Tia morala respondeco iafoje min timigis.

2 - Mia regimento garnizonis en Euskirchen, urbeto en Rejna Prusio, inter Bonno kaj Aĥeno, inter Treviro kaj Kolonjo.

Mi loĝis ĉe vidvino de inĝeniero, samaĝa kiel mia patrino. Ŝi dorlotis min kiel filon. Ŝi estis nigrahara rejnlandanino, fajr-okula, babilema. Kontraste, ŝia edzo, kies portreto pendis en la salono, estis blonda pruso kun dikaj lipharoj kaj severa mieno.

Ilia 14-jara filino Maria, delikata knabino kun bluj okuloj kaj blondaj harplektaĵoj, pli similis la patron, sed kun ina mildeco. Maliceta, ŝi amis pike spiteti min. Mi metis foton sur la kamenbreton. Maria demandis: "Kiu? - Mia fianĉino. - Ja, ja, ŝi ride flustris: germana "fianĉino"! Ŝi obstine tion kredis - aŭ ŝajnigis - ĝis venis Ivona vizite kun sia patro.

Maria foje diris al mi: "Venkintoj vi estas, sed ni germanoj estis solaj kontraŭ la tuta mondo. Kaj Germanio ne estis invadita. - Nu, bone, mi respondis ridante. Sed ne tiel flamiĝu: vi pli similas al rejna niksino ol al valkirio el Valhalo."

Nun ŝi fariĝis multe pli pacema. Ŝi edziniĝis post la lasta milito kun eksbatalanto, kiu estis transportita en Usonon kiel militkaptito. Post pli ol 50 jaroj ni daŭre korespondas kiel malnovaj amikoj.

3 - La germana popolo, en tiu Rejnlando, kiu iam konsistigis departementojn de la unua franca respubliko, rilatis afable kun la anoj de la okupanta armeo. La civiluloj trovis la francajn oficirojn malpli arogantaj ol la antaŭmilitaj prusaj.

Pro la perdoj kaj ruinoj kaŭzitaj de la milito, Francio troviĝis en malbona ekonomia situacio. Sed la stato de Germanio estis eĉ multe pli malfavora. Inflacio atingis katastrofan proporcion. La germana registaro, fakte bankrotinta, ĉesis pagi la "riparajn monkompensojn". La eks-prezidento Poincaré, tiam ĉefministro (des pli potenca) ordonis etendi la militistan okupadon al la industria Rur-teritorio, kaj rekvizicii karbon el tieaj minejoj.

Tiam, laŭ supera ordono, la germanaj fervojistoj, en la tuta okupata teritorio* unuanime ekstrikis. La francaj kaj belgaj okupaŭtoritatoj devis preni enmane la ekspluatadon de la fervoja retaro, grandparte sabotita.

* Escepte de malvasta regiono ĉirkaŭ Kolonjo, okupata de anglaj trupoj, ĉar Britio ne asociiĝis al la perforta ago de niaj registoj.

Patriotisma reago radikale ŝanĝis la sintenon de la rejnlanda popolo en ĝia plimulto. Ĝi komencis "pasivan rezistadon", evitis kontaktojn kun la okupantoj, denove rigardataj kiel malamikoj. La ŝovinistoj reaktiviĝis. Najbara junulino, fianĉino de franca leŭtenanto, ricevis minacojn pri hartondo. Ŝia patro laŭte proklamis: "Se iu tion aŭdacos, mi mortigos lin". La knabino ne estis tondita. Jaron poste ŝi edziniĝis kun sia leŭtenanto; ili loĝas nun en Nancio.

Mia bataliono estis sendita al Uerdingen-ĉe-Rejno, apud Krefeld, por gardi fervojan sektoron. Tie, tage kaj nokte, pasis sur la reloj longaj vagonaroj kaj sur la riverego pezaj barĝoj, ŝarĝitaj per karbo, kiun ili transportis en Belgion kaj Francion.

Trans Rejno la altaj kamentuboj ĉesis fumadi. Nokte, la altfornoj, kies lumo ruĝigis la ĉielon, unu post alia estingiĝis. Mi vizitis la industrian urbegon Essen, feŭdon de la Krupp-dinastio. Ĝi aspektis kvazaŭ morte.

La popolo pliprofondiĝis en mizeron. Ĉe iuj la malespero paroksismigis la malamon al la subpremantaj venkintoj. En Bochum okazis sanga stratbatalo inter franca taĉmento kaj ribelantaj laboristoj helpataj de la loka *Schupo**. Sekreta asocio celis murdi francajn oficirojn. Unu el ĝiaj membroj estis arestita, kondamnita kaj ekzekutita. Tio estis, miaopinie, mistrafo, grava mallertaĵo. Kaj la estonteco pravigis min: el tiu teroristo la nazioj, dek jarojn poste, faris martiron kaj nacian heroon.

Mi komprenis la ĝustecon de mia prognozo, kiam en 1918 mi antaŭtimis tro kompletan venkon, kaj la sekvojn de tro severa pritraktado al la venkitoj.

Mi ne sciis, ke en munkena kelo, iu senfama eks-kaporalo, vundita, gasumita, ne rezignaciinta pri ia "mensoga" malvenko, revas pri revengo. Mi ne sciis, ke per lia aliĝo al la skeleta grupeto de DAP**², tie koncipiĝis la triumfonta naci-socialista partio. Mi ne sciis, ke tiu paranojulo celas diktatorecon super la tuta mondo, kaj ke lia freneza ambicio ekbruligos la plej gigantan incendion, kiu iam disvastiĝis sur la tero. (Li certe, sed ne li sola; ankaŭ ne nur li

* *Schutzpolizei*, la germana ĝendarmaro, armita per la fama aŭtomatpisto "Parabellum".

** *Deutsche Arbeiter Partei* : Germana laborista partio.

kun siaj kunuloj, la estontaj "militkrimuloj" de Nurenbergo*: kulpuloj estis ja ankaŭ en aliaj landoj, eĉ inter iliaj juĝantoj.)

Mi ne sciis, sed mi vidis.

Mi vidis, ĉe la belaj Rejnobordoj kaj en la vestfalia Rurvalo, en la jaroj 1923-24: tie kaj tiam ekmaturiĝis la venenaj fruktoj de la Versajla diktato; tie kaj tiam mi ekvidis antaŭsignojn de la dua mondmilito.

4 - En septembro 1922, mia regimento partoprenis en grandaj manovroj sur la pontokapo de Bonno, ĉe la dekstra Rejnobordo, en la valo de rivero Sieg.

Ĉiutage ni tranoktis en alia kantonmento. Ĉiumatene, post foriro de la trupo, mi restis sola dum ses horoj: kiel plej juna oficiro, kaj iom parolanta germanlingve, mi estis komisiita por eventuale ricevi plendojn de la loĝantoj, diskuti kaj decidi pri monkompensoj, kaj fine ricevi la "ateston pri bonvivo" (bona konduto), subskribitan de la urbestro aŭ de la vilaĝestro (komuna reprezentanto).

Tiun matenon mi sidis en lia farmo kun la vilaĝestro, vidva kampulo proksimume 60-jara. Neniu plendo anonciĝis. Ni interparolis pri diversaj simplaj temoj: vetero, kamplaboroj ks.

Venis la tempo de mia foriro. La maljunulo subskribis la ateston. Mi reprenis la sakon, kiun mi kutime kunportis, kaj trovis ĝin pli plena kaj pli peza ol; antaŭe: en ĝi estis, zorge envolvitaj, belaj pomoj kaj piroj el la fruktoĝardeno de mia gastiganto. Konfuzite, mi dankis pri tiu simpla kaj diskreta donaco, protestante pri troa afableco.

Li simple respondis: "Ne", skuante la kapon. En liaj okuloj pasis dolora rideto. Post mallonga hezito, li malfermis pordon, kaj diris: "Venu."

Dormoĉambro. Super la litkapo, kadro kun pligrandigita fotoportreto. Tre juna viro sen barbo, en grizverda uniformo, kun la nigra insigno de la fera kruco sur la brusto.

Mi emociite rigardis tiun bildon. La maljunulo, preskaŭ neaŭdeble, diris:

"Mia filo. Leŭtenanto kiel vi.

Mortigita ĉe Verduno. Tiam samaĝa, kiel vi estas nun.

Vi similas al li."

* En Nurenbergo, la urbo, kie okazis antaŭ kaj dum la milito, la plej grandiozaj hitleranaj manifestacioj, estis poste juĝitaj, de escepta tribunalo, la germanaj militkrimuloj.

Nekapabla ion diri, mi silente premis lian manon.
Verduno...
Fernando...
Tiu junulo... Tiu maljuna patro...
Kia stultegaĵo, la milito!

Nimo - Florako 1977.



"La popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian"

Glosaro

1. Neologismo trovebla en PIV kun alia senco:

tirajloro: infanteriano el koloniaj trupoj, similaj al zuavoj, sed konsistantaj el indiĝenaj soldatoj: alĝeriaj, tuniziaj, marokaj, senegalaj, malagasaj, anarnaj kc. tirajloroj.

2. Ne en PIV:

ŝesio: ĉapo el ruĝa drapo, cilindroforma, kiu estis la kapvesto de zuavoj kaj afrikaj tirajloroj.

3. Fremda vorto ne esperantigita: Kaiser : germana imperiestro.

4. Propraj nomoj esperantigitaj:

Aleso Alès: urbo en departemento Gard, NW de Nimo.

Amieno (Amiens): urbo en Pikardio (PIV), ĉefurbo de dep. Somme.

Anduzo (Anduze) : urbeto apud Aleso.

Arkangelsko : rusa havenurbo ĉe rivero Dvino (PIV), proksime de ĝia elfluo en Blankan Maron.

Bajono (Bayonne) : ĉefa urbo de la franca parto de Vaskolando, en dep. Pyrénées-Atlantiques.

Florako (Florac) : urbeto en Cevenoj (PIV), dep. Lozère.

Kastro (Castres) : naŝkiĝurbo de Jaurès, dep. Tarn.

Kropotkino (princo Petro) : unu el la plej famaj teoriistoj de anarkio. Aŭtoro interalie de **Etiko** (esp. traduko eldonita de SAT). 1842-1921.

Mendo (Mende) : urbeto, ĉefurbo de dep. Lozère.

Nancio (Nancy) : lorena urbo ĉe Mozelo (PIV), ĉefurbo de dep. Meurthe-et-Moselle.

Sambro (Sambre) : franca kaj belga rivero, alfluanto de Mozo en Namuro (PIV).

San-Stefano (Saint-Etienne) : ĉefurbo de dep. Loire, karbo-mina kaj industria centro (metalurgio, cikloj, armiloj).

Seto (Sète, antaŭe Cette): havenurbo ĉe Mediteraneo, en dep. Hérault.

Taraskono (Tarascon) : urbo ĉe Rodano (PIV), norde de Arlezo.

Uzeso (Uzès) : urbo en dep. Gard, norde de Nimo, iama ĉefurbo de granda duklando.

5. Propraj nomoj ne esperantigitaj kaj ne klarigitaj en la teksto aŭ per piednotoj.

Altkirch (Altkirĥ) : urbeto en suda Alzaco.

Gabriele d'Annunzio (d'Anunco) : itala poeto, romanisto kaj aviadisto (1863-1938).

Barbusse (Henriko Barbüs') : franca romanisto: **L' Enfer** (La Infero) 1913 - **Le Feu** (La fajro) 1916 - **Clarté** (Helo) 1918. (1873-1935).

Bochum (Boĥum) : industria urbo en Rurvalo (Vestvaflio).

Charleroi (Ŝarĥrŭa) : belga urbo ĉe Sambro.

Chavet (Gabrielo Ŝave') : elstara membro de la Pariza esp. grupo kaj de la OKK por la 10a kongreso.

Chemin des Dames (Ŝmen de Dam) montkreska vojo en departemento Aisne, kie okazis drastegaj bataloj en 1917 kaj en 1918.

Clémenceau (Georgo Klemanso') : kuracisto kaj politikisto, plurfoje ministro kaj ĉefministro, kromnomita "La Tigro" kaj "Patro-la-Venko". (1841-1929).

Craonne (Kraon') : urbeto en dep. Aisne.

Essen (ĉefa centro de industrio en Rurvalo. Vd. Krupp.

Faure (Sebastiano For) : anarkiista verkisto kaj oratoro.

Garibaldi (Jozefo) : itala patrioto kaj revoluciisto, kiu, kun siaj ruĝaĉemizaj partianoj, kontraŭbatalis Aŭstrion, Napolan Reĝolandon, Papan Regnon kaj, en 1870, la prusojn en Francio (1807-1882).

Grave (Johano Grav) : teoriisto de anarkio.

Grosjean-Maupin (Groĵan'-Mopen') : esperantista leksikologo, aŭtoro de vortaroj fr.-esp. kaj esp.-fr., ĉefa aŭtoro de PV.

Hindenburg (feldmarŝalo von H.) : generalisimo de la germanaj armeoj, al kiu estis atribuita la venko en Tannenberg. Ekde 1925, prezidento de la germana respubliko, de 1933 kun Hitler kiel kanceliero (1867-1934).

Jaurès (Johano Ĵores') : franca socialisto. Kuraĝe kontraŭbatalis la militon. Murdita de fanatika patrioto (1859 - 31an de julio 1914).

Krefeld : germana urbo okcidente de Rejno, proksime de la nederlanda landlimo.

Krupp : familia nomo de industriistoj, kies metalurgiaj uzinoj en Essen fabrikis kanonojn por la germana armeo.

Liebkecht (Karlo Libkneĥt) : germana revoluciisto, kaptita en stratbatalo kontraŭ la armita forto de la socialdemokrata registaro, kaj murdita en karcero (1873-1919).

Louvain (Luven') : urbo en Valonio (PIV), fama universitato.

Ludendorf (feldmarŝalo von L.) : ĉefa helpanto de Hindenburg, kiu fakte mem funkciis kiel generalisimo en la fino de la milito (1865-1937).

Luxemburg (Roza Luksemburg): juddevena germana teoriistino de socialismo, revolucia agitistino, mortigita samtempe kiel Libkneĥt (1876-1919).

Montcalm (Luizo, markizo de Monkalm'): heroo de la milito kontraŭ la angloj en Kanado, mortigita ĉe Kebeko (1712-1759). Ĉar li naskiĝis en dep. Gard, lia nomo estis donita al kazerno en Nimo.

Musset (Alfredo de Muse'): fama romantika poeto (1810-1857).

Pershing (Prŝin): ĉefgeneralulo de la usona armeo en Francio (1860-1948).

Poincaré (Rajmundo Pŭenkare): advokato kaj politikisto, kuzo de la fama matematikisto kaj fizikisto Henri Poincaré. Prezidento de 1913 ĝis 1920, ĉefministro en 192 (1860-1934).

Pré Saint-Gervais (Pre Sen Ĵerve'): vastega placo ĉe la iamaj fortikaĵoj nordoriente de Parizo, kie tradicie okazis grandaj popolkunvenoj kaj manifestacioj.

Rethondes (R'tond'): vilaĝo en dep. Aisne, kie estis subskribitaj, ĉe vojkruciĝo en la arbaro de Compiègne, la armisticoj de 1918 kaj 1940.

Romain Rolland (Romano Rolan'): verkisto kaj pacisto, aŭtoro de "**Jean-Christophe**" (Johan-Kristoforo) (1866-1944). Nobelpremio 1916.

Thann: urbeto en suda Alzaco, okcidente de Mulhaŭzo.

Venizelos: greka politikisto, plurfoje ĉefministro inter 1910 kaj 1935 (1864-1936).

Tabelo de enhavo

p.

- 3. Dediĉo.
- 5. Antaŭparolo.
- 7. Prologo.

I. 1914

- 9. 1. Freŝa kaj ĝoja.
- 10. 2. Misagordoj.
- 13. 3. Eniro en la realon.
- 14. 4. Burlesko en tragedio.
- 15. 5. Nova papo.
- 15. 6. Unua aŭtuno.

II. 1915

- 19. 1. Printempo en militanta lando.
- 21. 2. Viroj el Tunizio.
- 23. 3. Patro al fronto.
- 24. 4. Viluloj kaj civiluloj.
- 26. 5. Grandaj eventoj.
- 27. 6. Ĉiutaga vivo for de la bataloj.
- 28. 7. Intermezo.
- 30. 8. Dua vintro.

III. 1916

- 32. 1. Verduno.
- 33. 2. Militeto en lernejo.
- 35. 3. La "boŝoj".
- 36. 4. Patro evakuita.
- 37. 5. For de la batalkampoj, vivo daŭre floras.
- 39. 6. Revo de batalantoj.
- 40. 7. Malamikoj interfratumas. Parencoj interdisputas.

IV. 1917

43. 1. Longa tunelo.
44. 2. Ŝtorma printempo.
46. 3. Dolĉa printempo.
48. 4. Milda lumo estingiĝis.
49. 5. Tutmonda brulego.
49. 6. El fora praepoko...
51. 7. Mi havis kamaradon.
52. 8. Bela somero. Vivo ŝprucas.
54. 9. Morto ree kaj ree frapas.
56. 10. La Kanto de la Ĝirondistoj.
56. 11. Pacemo oriente, "ĝisfinismo" okcidente.
57. 12. Trajektorioj;

V. 1918

58. 1. El oriento lumo?
 58. 2. Espero ekfloris - kaj velkis.
 61. 3. Patro rakontas. Onklo rakontas.
 63. 4. Mia "frato" Roĝero.
 65. 5. Rekrutrevizio. Barcelono?
 66. 6. Morto de instruisto.
 67. 7. Somero. Ekzameno. Ferio.
 67. 8. Vivo kaj morto de junulo.
 68. 9. Hispana gripo.
 68. 10. Antaŭsignoj de la fino.
 71. 11. Armistico.
-
75. Epilogo.
 80. Glosaro.